

EL POPOLA

中國報通

9 1984





Moroj de

Tuĝja-oj

Fotoj de HAN HUANGCUN

La tuĝja-oj loĝas en la limregiono de la provincoj Hunan, Hubej, Siĉuan kaj Gujĝoŭ, kie ondas montoj, favoras milda klimato kaj abunda pluvokvanto. Ili okupiĝas ĉefe pri terkulturo kaj forstokulturo.

La tuĝja-oj havas siajn originajn tradician kulturon kaj metiar-ton, inter kiuj estas la bela kaj fortika litkovrilo kaj la aparte belforma, nigre purpura fajencaĵo rigardataj kiel floroj de la loka metiarto. La tuĝja-oj estas lertaj en dancado kaj kantado. La mansvinga danco estas populara ĉe la viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj. La kostumoj kaj superteraj loĝdomoj de la tuĝja-oj havas apartan guston.



Al foiro

Foto de JA CUJBAJ





Mansvinga danco

Je Jucuj, lerta en teksado de litkovrilo, instruas al junulinoj teknikon.




Litkovrilo





Knabino ludas nacia muzikilon.



Te-servico el nigre purpura fajenco

Ŝtuparaj kampoj de tuĝja-oj

Foto de U ŜENĜJAN





Supertera domo de tuĝja-oj
Foto de SJONG ĜIDONG

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto:
Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)
Esperanta Sekcio
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Libro estas fenestro de scioj

Pentrita de ĜANG ANPU

**SUR AMBAŬ PAĜOJ DE LA
DORSKOVRILO:**

Esperantaj poŝtmarkoj

KOLORAJ SERIOJ:

Moroj de Tuĝja-oj

Ĝiŭhŭa-monto

Fotoj faritaj de esp-istoj

Ĉe la piedo de Helan-montaro

La dancdramo "Meĉo-floro"


NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Moralaj agoj de junuloj

En universitato por maljunuloj

Enhavo

Ili kreas por si novan vivon	2
Ĉina ekonomia reformo	7
Daĝaj hodiaŭ	10
Sude kaj Norde de la Granda Muro (9): Montpasejo Helan	50
KURANTAJ AFEROJ	44
Kie vi, amikoj?	12
S-ino Nancie Durham	14
Esperanto kaj filatelo	16
POR KOMENCANTOJ: Transloĝiĝo	24
ESP-NOVAĴOJ	19
Fondita la sciencista kaj teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj en Pekino	20
SUR NIA LIBROBRETO: Kiel konkeri la koron de nees- perantistoj	21
Ili strebas al rejuniĝo	35
Por la sano de la infanoj	37
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Kuracaj vinoj de Ĉinio	23
POR VIA SANO: Memkuracado de hipotensio	27
ĜENRO PRI NACIMALPLIMULTOJ: Gasti en Tuĝja-a vilaĝo	28
Ĉarma dancdramo de Mjaŭ-nacieco	30
Varma pluveto (Novelo)	39
Hungara scienculo Sandor Korosi Csoma Primemorigata en Pekino	34
VIDINDAJ LOKOJ: Bela pejzaĝo de Ĝiŭhŭa-monto	25
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Politiko kaj ekonomio de Ming- dinastio	46
ĈINLINGVA KURSO: Naŭa leciono	32
KORESPONDI DEZIRAS	34



ILI KREAS POR SI NOVAN VIVON

PRI LA NUNAJ ĈINAJ GEJUNULOJ

EN la n-ro 5, 1983 nia revuo havis artikolon, kiu konigas pri ĉinaj gejunoj en esplorado pri la celo de la homa vivo. Ĝi interesis niajn legantojn. De tiam pasis tri jaroj. Kion faras nun la ĉinaj gejunoj? Sube ni prezentas kelkajn fragmentojn de ilia vivo.


SCIOJ ESTAS FORTO

— En la kemifabriko Longa Marŝo de Pekino estas juna laboristo, kiu iam diris publike, ke li amas nur cigaredojn, vinojn kaj monon. Li tiam volis manĝi ĉiajn ladmanĝojn kaj kukojn en la vendejoj kaj vojaĝi al turismaj lokoj. Sed en la aktivado de legado aranĝita de la fabriko li legis multe da utilaj libroj, pro kio larĝiĝis lia vidkampo: La filozofiaj scioj konigis al li la veran signifon de la vivo; la verko “Moderna Historio de Ĉinio”, kiu priskribas la mizeron de la ĉina popolo kaj ĝian prikantindan batalon kon-

traŭ la fremda agreso, profunde edifis lin. Li diris: “Antaŭe mi vivis kvazaŭ ebrulo, sed la historio vekis min.”

— Li Ĝing estis promociita al la unuaklasa telefonistino de la triaklasa. Ŝi parkerigis pli ol 2 600 telefonnumerojn. Ŝi servas fervore kaj manipulas precize. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi finis sian studon en teknika lernejo kaj fariĝis telefonistino de la telekomunika buroo en la urbo Harbin, Hejlongĝjang-provinco. Komence ŝi opiniis, ke tiu laboro estas neesperiga. Tial ŝi ofte babilis kun telefon-uzantoj en laborhoroj kaj pro tio ricevis oficialan averton de la buroo. Sed en la aktivado de legado, la libro “Brilanta Vojo de la Vivo — pri la Bonkondutoj de Ĝang Hajdi” kiel mangneto altiris ŝin (Ĝang Hajde estas Esperanto-amikino. Malgraŭ sia paraliziĝo, ŝi restas firmvola. Pri ŝi nia revuo havis specialan artikolon en la n-ro 7, 1983). Antaŭ la brila ekzemplo

Libro saĝigas homojn.



ŝi profunde hontis kaj pentis. Ŝi sentis, ke ŝi vane havas sanan korpon, sed mankas al ŝi nobla idealo. Kiel oni vivas nur por si mem? Iom post iom ŝi ŝanĝiĝis en sia konduto. Somere de la pasinta jaro oni alvokis per longdistanca telefono iun de la Elektra Politeknika Instituto. Tiam la instituto jam finis sian tagan laboron. Post sia deĵoro Li Ĝing, antaŭ ol vespermanĝi, sin direktis tien malgraŭ forta pluvo kaj fine transdonis la informon al la alvokito.

La supre menciitaj okazis antaŭ nelonge, kiam la tutan landon envolvis la aktivado de legado. La aktivado aperis unue inter la laboristoj kaj oficistoj de Ŝanhajo kaj nun jam altiris al si dek unu milionojn da gejunuloj. La 27-an de marto 1982 en la fronta paĝo de la ŝanhaja tagĵurnalo Jiefang estis publikigita anonco pri aktivado de legado kune iniciatita de la urba Ĝenerala Laborista Sindikato, la Urba Komitato de la Komunisma Junulara Ligo, la Redakcio de la ĵurnalo kaj la urba buroo pri eldonado. Ĝis la 20-a de aprilo la redakcio de la ĵurnalo ricevis pli ol 2 000 leterojn el 20 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, el kiuj plejparto preferis titoli la aktivadon per "POR REPROSPERIGI ĈINION". Tiel la aktivado leviĝis unue en Ŝanhajo kaj rapide envolvis la tutan Ĉinion. Iuj komprenis la veran signifon de la slogano "nur socialismo povas savi Ĉinion", leginte la ĉinan historion (precipe ĝian modernan parton). Aliaj kun granda avido lernas sciencajn kaj kulturajn sciojn. Nun lerni en la universitatoj vespera,

koresponda kaj televida jam fariĝis modo kaj lernolibroj kaj referencaj materialoj en la librejo havas grandan debiton. Ŝjaŭ Ljang, riparisto de la Ŝanhaja Porvirina Magazeno diligente lernis du jarojn en la Oficista kaj Laborista Universitato de la Ŝanhaja Komerca Buroo kaj venkis dekojn da diplomitaj studentoj en la ekzameno por esplorantoj-studentoj kaj iris eksterlanden por studi ekonomikon.

En la lasta oktobro la Centra Komitato de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo, la Tutĉinia Junulara Federacio kaj la Tutĉinia Federacio de Lernantoj decidis disvolvi aktivadon pri legado kaj rekomendis 60 librojn pri historio, politika teorio, biografio, ideologia memkulturado, literaturo, arto kaj naturaj sciencoj. En diversaj lokoj de nia lando okazis aktivadoj en kelkdekaj formoj, inkl. de prelego, diskurso, rakonta kunveno, konkursoj de poema deklamo kaj parolado, verkado kaj kaligrafado kaj filatela ekspozicio pri la moderna historio, interŝanĝo de devizoj pri librelegado, invito de veteranaj verkistoj por konigi librelegadon ktp. Iuj unuoj aranĝis legadan monaton, aliaj organizis la gejunulojn al socia esploro kaj vizito. Ĉio ĉi levis iliajn interesojn pri legado, profundigis ilian komprenon al la legita libro kaj riĉigis ilian postlaboran vivon.

La aktivado helpas pli kaj pli da gejunuloj forĵeti nescion, malklerecon kaj barbarecon kaj donas al la esperdonaj gejunuloj forton strebi antaŭen. Kredeble ĝi daŭros plu inter la ĉinaj gejunuloj.

*Post la akcidento sur
Hŭaŝan-monto*





Junaj ministoj helpas kamparanojn en rikolto de tritiko.

KIAM DANĜERO MINACAS ALIAJN

La 1-an de majo, 1983, sur Hŭaŝan-monto fama pro siaj belaj pejzaĝoj moviĝis amasoj da vojaĝantoj, dume la mallarĝa vojo Ĉjanĉiĝuang sur la monto estis precipe homplena.

Estis ĉ. la 7-a matene. En korŝira krio dekelkaj turistoj falis de la supro de Ĉjanĉiĝuang, la 80-grada klifo kun 200 ŝtupoj. Ili ruliĝis kaj saltis sur la kapoj kaj ŝultroj. Inter la turistaj amasoj leviĝis teruraj krioj. Kiu aŭdacos malhelpi la ruliĝadon, tiu falos en la abismon! Kiu povos forigi la neatenditan katastrofon? En tiu kriza momento grupo da bravaj junuloj elpaŝis. Ili estis studentoj de la Kvara Armea Medicina Instituto. Ili forlasis feran ĉenon en siaj manoj kaj etendis la manojn al la falantoj.

Iu mezaĝulo estis haltigita, alia junulino estis kaptita kaj tria ĉesis rulfali. . . Sango makulis iliajn vestojn. Ili sukcesis haltigi la rulfalantajn montogrimpantojn ĉe la montotalio.

Samtempe kun tio, instinkte svarmis malsupren la homoj sur la meza kaj malsupra partoj de la vojo Ĉjanĉiĝuang. Pro la rulfalo, interpuŝiĝo, kaj interpremo, pli ol 20 turistoj estis elpremitaj de la vojo kaj glitis laŭ la glata rokmuro al la

profunda valo. Studentoj, kies menson lumigis subita saĝo, elĵetis siajn tornistrajn ŝnurojn kaj tiris supren la falintojn.

Je la 3-a ptm. danĝera akcidento estiĝis ĉe alia grava vojo de la monto. Tie staras alta rokmuro unuflanke kaj kruta klifo aliflanke. Sur tiu mallarĝa vojo amasiĝis miloj de turistoj, kies puŝiĝado kurbigis la sekurigan ĉenon ĉe la vojrandado. Eltiriĝis unu el la ĉenfostoj. La turistoj ĉiusekunde povus fali en la abismon! En tiu kriza momento elpaŝis ankaŭ la studentoj de la Kvara Armea Medicina Instituto. Ili, firme sur la danĝera krutaĵo ekstere de la sekuriga ĉeno, rampe proksimiĝis al la danĝera loko. Ili mano en mano, ŝultro ĉe ŝultro kun aliaj bravaj turistoj formis homan spaliron vizaĝe al la morto kaj dorse al la klifo. Nur dank' al tio malrapide ekmoviĝis la homamaso stagninta pli ol ses horojn.

Danĝero pasis por la amasoj, sed ĝi ankoraŭ minacis la grave vunditajn. Inĝeniero falinta de Ĉjanĉiĝuang estis vundita ĉe tri lokoj sur la kapo kaj senĉese sangis. Iu junulino rompis al si la maldekstran kruron, alia junulino grave vundiĝis je la kapo kaj la tria kolapsis pli ol ses horojn. La studentoj ĝustatempe portis la vunditojn al hospitalo ĉe la montopiedo pli ol dek kilometrojn fore. Sed survoje al la hospitalo kolapsis pluraj studentoj portantaj la brankardojn kaj falis svene. En la hospitalo, kuracistoj estis mirigitaj, ke la diagnozo fare de la studentoj estis tute ĝusta. Ili prezentis al la hospitalo valoran opinion pri kuracado.

Kiam la bravaj faroj okazintaj sur Hŭaŝan-monto ankoraŭ agitis la korojn de homoj, okazis en la lasta vintro aliaj kortuŝaj heroaĵoj. De la lago de Jingze-parko de Tajjŭan, Ŝanŝji-provinco kaj de Ĉenlju-lago de la zoo de Ŝiĝjaĝuang, Hebej-provinco sinsekve alvenis emociaj novaĵoj pri savado de homoj falintaj en akvon. Malgraŭ morta danĝero la savantoj (ĉefe junuloj) memvole formis solidaran kolektivon kaj savis dronantajn knabojn. En tiuj akcidentoj unu mezlernejanino kaj unu laboristo oferis sian vivon en la savado.

ILI ETENDIS SIAJN MANOJN AL SENHELPAJ HOMOJ

Vizaĝe al la morta danĝero la gejunuloj montris noblan sinoferemon. Kaj kiel ili konduktas en la ordinaraj tagoj? Jen kelkaj rakontoj:

80-jara avino Caj Ŝiping vivas sola en Hefej, la ĉefurbo de Anhuj-provinco. Februare de la

lasta jaro, ŝi ricevis leteron adresitan de "Lin Ŝen". La adresinto skribis en la letero, ke leginte la artikolon en ĵurnalo pri la komizino, kiu portis grenon al avino Caj plurajn jarojn, li (aŭ ŝi) sendormis la tutan nokton. Nun li (aŭ ŝi) komprenis, ke la vera valoro de la homa vivo troviĝas en la prizorgado al aliaj. En la letero la skribinto diris, ke estonte li (aŭ ŝi) sendos al la maljunulino monon ĉiumonate. Ekde tiam Caj ricevis ĉiumonate dekkelkajn ĵuanojn de "Lin Ŝen", kiu tamen ĉiufoje ŝanĝis sian adreson. Oni multe klopodis por trovi tiun sendinton, sed vane. Ĵurnalo publikigis tion por solvi la enigmon. Sed tuj post tio la maljunulino ricevis pli da mono el multaj anguloj de nia lando. Knabino de la Telekomunika Buroo de Hefej anoncis, ke ŝi estas nepino de Caj kaj vizitis la maljunulinon ĉiun duan tagon por helpi ŝin en dommastrumado. Iu kampara knabino donacis al ŝi du kokinojn en la Aŭtunmeza Festo (la 15-a de la oka monato laŭ la ĉina luna kalendaro). Ŝi dommastrumis por la maljunulino du tagojn kaj prenis ŝu-mezuron por la maljunulino antaŭ la foriro kaj poste faris por la avino paron da komfortaj ŝuoj.

En Sijang-gubernio, Ĝjangsu-provinco estis tri orfoj, kies patro mortis pro malsano, kaj post tio reedziniĝis ilia patrino. Liŭ Ĝaŭljang, onklo de la tri orfoj, senhezite prenis sur sin la taskon vivteni la orfojn. Iuj maltrankviliĝis por li: Liŭ estas malriĉa, kaj nun devas vivteni tri infanojn, tio certe pli malriĉigos lin, kaj eble li ĉiam restos fraŭlo. Sed fratino de la patrino de la tri orfoj ekamis lin kaj edziniĝis al li pro lia nobla spirito. Nun la tri infanoj estas bone prizorgataj. La familio vivas harmonie.

Kampara knabino Ŝjaŭ Gaŭ devis ricevi operacion en hospitalo de Kantono. Sed ŝi ne havis tie parencojn, nek amikojn. Rememorante helpemajn junulojn de la unua laborejo de la Kantona Naviginstrumenta Fabriko konigitajn en ĵurnalo, ŝi senpripense skribis al ili por peti helpon. Poste, de kiam ŝi atingis Kantanon per trajno ĝis ŝi elhospitaliĝis, ŝi estis atente prizorgata.

...

Tiaj faroj estas sennombraj. Ili estas kaj ordinaraj kaj edifaj.

JUNULA STURMA TAĈMENTO

Cirkulas populara kanto inter junuloj de Ĉinio:

*Arbare kreskas valorega fungo
Montare ĉarmas jado en atendo.
Se volas vi ekkonatiĝi kun mi,
bonvolu veni al junul-taĉmento.*

La junula sturma taĉmento estas fiero de la gejunuloj kaj allogas al si multajn junajn gevirojn.

La hotelo "Granda Muro" en la orienta antaŭurbo de Pekino estas unu el la plej grandaj entreprenoj konstruitaj per ĉina kaj eksterlanda kapitalo. Pro iu neatendita kaŭzo ĝia konstruo estis prokrastita je ses monatoj. Por garantiĝian inaŭguron en la dato difinita laŭ la interkonsento, la junuloj de la Sesa Domkonstrua Kompanio de Pekino prenis sur sin tiun urĝan taskon.

Oni taskis la instaladon de la elektraj aparatoj al la junula sturma taĉmento estrata de Doŭ Jonghuj. Antaŭ la membroj de la taĉmento kun malalta teknika nivelo estis pli ol 200 desegnopaperoj plenaj de komplikaj lineoj. En dekoj da tagoj ili devis instali 13 000 elektrajn aparatojn kaj 500 000 metrojn da lineoj. Pro la intensa laborado iuj junulinoj frote vundis siajn manplatojn, sed ili plu laboris senbrue. Fine la

Jang Ĉuanljang, membro de la Komunisma Junulara Ligo de Ĉinio, prizorgas la vidvon dek jarojn.



taĉmento plenumis la taskon laŭ la interkonsento.

Pro manko de ĉarpentistoj ankaŭ la sturma taĉmento de masonistoj eklaboris por fiksi al la muro gipsajn tabulblokojn. Sur unu gipsa tabulo 2.8 metrojn alta kaj 1.2 metrojn larĝa oni devas fiksi 250 ŝraŭbojn. La projekto postulas, ke la ekarto de ŝraŭba profundeco ne superu unu milimetron nek tiu vertikala de gipsa tabulo du milimetrojn. Sendube estas malfacile plenumi la taskon por tiuj, kiuj al kutimiĝis al masonado. Tamen la diligentaj lertaj junuloj lernis en praktiko kaj fine levis sian laborefikon je 265% kaj 97.4% de la laboro estis bonkvalitaj. La dek sturmaj taĉmentoj pene laboris du monatojn tute sen ferioj. Ili ĉiutage plenumis meznombro 170% de la difinita tasko kaj brile plenumis la taskon.

Sole en la Sesa Domkonstrua Kompanio estas 26 tiaj sturmaj taĉmentoj. Bedaŭrinde mankas statistiko pri ilia totala nombro en la tuta lando. Nun la procentoj de junaj gelaboristoj plimultiĝas jaron post jaro, la gejunuloj fariĝis nova ĉefa forto en la socialisma konstruado.

Same kiel la gejunuloj en la industria produktado, la junaj kamparanoj okupiĝas pri granda kariero, ne konata de iliaj antaŭuloj. Jang Ŝjaŭjun kaj Hŭang Hantaŭ, reprezentantoj de la Tutlanda Popola Kongreso kaj superklasaj labormodeloj de Hubej-provinco, estas la plej elstaraj el la kamparaj junuloj. En 1982 Jang produktis ĉ. 16 tunojn da greno sur 1.4 hektaroj da kampoj kaj vendis 12 tunojn al la ŝtato, kaj Hŭang vendis al la ŝtato 11.5 tunojn da greno. En la nuna


tempo, kiam la terkultura tekniko estas malalta en Ĉinio, gajni tiajn sukcesojn ne estas facile.

La kamparanoj de la juna generacio ne nur produktis pli multe da greno kaj kotono, sed ankaŭ rompis la miljaran tradicion, ke kamparanoj ne devas forlasi la teron. Nun la superflua laboruloj komencis forlasi terkulturadon kaj ekokupiĝis pri komerco kaj industria produktado. En Dengta-gubernio de Ljaŭning-provinco cirku- las rakonto pri kampara junulino Hong Jaĝjŭan, kiu venis en la urbon kaj tie administris vestofarejon laŭ kontrakto.

La 29-jara Hong Jaĝjŭan revenis sian hejmvilaĝon post diplomiĝo de supera mezlernejo kaj ellernis eminentan teknikon de vestoprojektado kaj tajlorado. Oktobre de la lasta jaro ŝi faris kontrakton kun la gubernia serva kompanio kaj laŭkontrakte administris junulan vestofarejon, kiu bankrotis pro defcito en sinsekvaj jaroj. Por kolekti kapitalon ŝi lombardis siajn domon, televidilon kaj brakhorloĝon. Ŝi fariĝis ĝia direktoro kaj faris kuraĝajn reformojn. Ŝi donis grandan atenton al merkataj informoj kaj pensmaniero de la konsumantoj. La de ŝi projektitaj infanaj vestoj vendiĝis en Pekino, Tjanĝin, Ŝenjang, Harbin kaj aliaj urbegoj. En duonjaro ŝia vestofarejo gajnis profiton de 36 900 jŭanoj.

Nun la tajdo de struktura reformo envolvis la tutan landon. En la antikva sed ankaŭ juna Ĉinio, kies meznombra loĝantara aĝo estas nur 26 jaroj, aperis multaj junaj reformistoj, direktoroj, fabrikestroj kaj entreprenistoj. La juna generacio kiel la leviĝanta suno realigas la idealon de la popolo.

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Harbin
2. Hŭaŝan-monto
3. Hefej
4. Daĝaj
5. Jinĉŭan
6. Ĝjinan
7. Tuĝja- kaj Mjaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Joŭ-
ĵang, Siĉŭan-provinco
8. Ĝiŭhŭa-monto

ĈINA EKONOMIA REFORMO

EKDE 1979, Ĉinio faris serion da ekonomiaj reformoj, kio multe plibonigis la ĉinan socialisman administran sistemon, forte akcelis disvolviĝon de la ekonomio kaj altigis la vivnivelon de la ĉina popolo.

Unu el la plej gravaj paŝoj de la ekonomia reformo en Ĉinio estas rompi egalisman distribuon.

Antaŭ la ekonomia reformo la entreprenoj devis doni la tutan profiton al la ŝtato, kiu siaparte devis, se necese, kovri por ĝi la deficiton. La laboristoj ĉiam ricevis la saman salajron, ĉu ili bone laboris aŭ ne. Rilate la kamparanojn, kiuj laboris sur la kampoj de la kolektivo, ĝenerale ricevis egalan kvanton da greno dum la jarfina divido de la rikoltaĵoj. Tiu egalismo malutilis la produktan aktivecon de la laboristoj kaj kamparanoj kaj katenis la ekonomian disvolviĝon.

Nun la respondeca sistemo de la produktado, praktikata en Ĉinio efike rompis tiun egalismen. En la kamparo oni praktikas individuan kaj kolektivan respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado, kiu anstataŭis la pasintan alte koncentran produktan sistemon. Laŭ la nova sistemo oni laboras sur la parceloj donitaj de la kolektivo laŭ kontrakto surbaze de la familioj, grupoj kaj taĉmentoj. Paginte la agrikulturan imposton al la ŝtato kaj plenuminte la

taskon donitan de la kolektivo, ili proprigis ĉiujn ceterajn agrikulturajn produktaĵojn al si mem.


Kompreneble efektiviĝo de la sistemo ne signifas retroiri al la pasinta individua ekonomio, ĉar la agroj ankoraŭ apartenas al la kolektivo, la kamparanoj ne rajtas disponi la teron laŭ sia plaĉo. Se kontraktanto estas mortinta aŭ transloĝiĝas, la agro devas esti redonita al la kolektivo. La ŝtato posedas gravajn ekonomiajn rimedojn, tial la komuna riĉiĝo de kamparanoj estas garantiata. La ŝtato donas apartan emfazon al la malriĉaj regionoj en helpado per investo kaj bonstatigo. La ŝtato ne donas diversajn produktajn taskojn al la kamparanoj, sed kontraktas kun ili pri liverado de kemia sterko,

agrikulturaj maŝinoj kaj aĉeto de agrikulturaj produktaĵoj. Samtempe, ĉiu kamparana familio ankoraŭ dependas de la kolektivo en uzado de irigaciaj instalaĵoj kaj grandaj agrikulturaj maŝinoj kaj preventado kaj eks-termado de plantaĵaj malsanoj kaj fiinsektoj.

En la pasintaj kvin jaroj, en la ĉina kamparo aperis ĝojindaj ŝanĝiĝoj. Laŭ statistiko, la totala agrikultura produktovaloro de la tuta lando en 1983 atingis 312 100 milionojn da jŭanoj, kiu pliiĝis je 9.5% kompare kun tiu en 1982. Kamparanoj nun povas ne nur bone nutri sin, sed ankaŭ povas aĉeti malgrandajn agrikulturajn maŝinojn, aŭtojn kaj televidilojn. Ankaŭ fridujoj videblas en iuj kamparanaj domoj. Pro la efektiviĝo de la

Kamparano Li Ljangcaj rikoltas tritikon en sia laŭkontrakte kulturata kampo.





Parto de la Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio de Pekino

produkta respondeca sistemo, la enspezo de la kamparanoj ĝenerale plimultiĝis, kvankam diferenciĝis ilia riĉeco, tamen tio ne signifas dupolusigon. La ĉina registaro permesis al parto de la kamparanoj riĉiĝi unuaj laŭ la socialisma distribua principo "de ĉiu laŭ lia kapablo, al ĉiu laŭ lia laboro". Se diligentulo kaj mallaboremulo ricevas egalan rekompencan, tio damaĝas la produktan aktivecon de la diligentuloj kaj kontraŭas la socialisman distribuan principon. Pro tio ĉiuj devas suferi de malriĉo.

Nun en la ĉina kamparo pli ol 90% de la kamparanaj fami-

lioj laboras laŭ la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado. Samtempe aperis familioj de faka produktado en forstokulturo, brutobredado, kaj flankokupoj. La respondeca sistemo de produktado ne nur akcelis la labordividon de la socio, sed ankaŭ altigis la produktan aktivecon de laborantoj, ĉar ĝi strikte interligas la produktadon kun la enspezo de la laboruloj. Faktoj pruvis ke tiu ekonomia politiko konformas al la kondiĉoj de Ĉinio kaj ludos gravan rolon en ĉina socialisma konstruado. Ankaŭ ĉinaj entreprenoj, servaj, komercaj kaj esploraj institucioj ekpraktikas la supre menciitan politikon.

En fabrikoj, ĉiu grupeto, skipo kaj laboristo havas klare difinitajn taskojn. Kiu superplenumas la taskon, tiu akiras premion; Kiu ne plenumis la taskon, tiu estas punata. Antaŭ la efektiviĝo de la respondeca sistemo, iu laboristo de la Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio ĉiam malfruiĝis al la deĵoro dum 15 jaroj, sed ne estis punita. En 1979 la kompanio dividis la taskon donitan de la ŝtato en 230 000 kvotojn kaj disdonis ilin al la laborejoj kaj grupetoj. Krome oni ankoraŭ difinis 1 000 000 diversajn laborajn kvotojn por personoj. Ekde tiam tiu laboristo ne plu malfruiĝis. Ĉar la profito de la entreprenoj rekte koncernas la individuajn enspezojn de ĉiu laboristo.

Unu el la plej gravaj trajtoj de la entreprenoj efektiviĝantaj la produktan respondecan sistemon estas larĝigo de ties memmastrumaj rajtoj, kio raciigis la distribuon rilatan inter la ŝtato kaj entreprenoj. En la dua duonjaro de 1983, la ĉinaj entreprenoj komencis praktiki la sistemon pagi imposton al la ŝtato laŭ difinita proporcio de la enspezoj, anstataŭ doni al ĝi la tutan profiton. Paginte la imposton, la entreprenoj rajtas uzi la restantan parton de la profito por plivastigi la produktadon, premi laboristojn kaj plibonigi ilian bonstaton. La sistemo liberigis la entreprenon el la dependa stato de ĝia supera administra organizaĵo kaj ŝanĝis ĝin en sendependan ekonomian vivplenan unuon. La entreprenoj, kiuj konstante suferis deficiton, ne plu povas sin vivteni per ŝtata subvencio, dum la entreprenoj bone administrataj povas ne nur pluaparte disvolvi sian produktadon, sed ankaŭ altigi

la enspezon de siaj laboristoj. Kompreneble tio estas praktika sub la premiso, ke la entrepreno plenumas la ŝtatan produktan planon kaj la ŝtatan ekonomian profiton.

La ĉina ekonomia reformo ankaŭ akcelis la disvolviĝon de kolektivaj kaj individuaj ekonomioj. En la pasinteco oni emfazis nur disvolvon de la ŝtata ekonomio. Fakte, disvolvo de sola ŝtata ekonomio kaj limigo kaj likvido de la kolektivaj kaj individuaj ekonomioj ne konformas al la realeco de la ĉinaj produktaj fortoj.

En Ĉinio ekstreme malegala estas la nivelo de produktado. En la kamparo iuj plugas teron per bovo, dum en la urboj troviĝas fabrikoj de aŭtomata produktado kaj en la tuta lando tri kvaronoj el la 400 milionoj da laborkapabluloj estas metiistoj kaj duonmanlaboruloj. En tiaj kondiĉoj, la kolektiva kaj individua ekonomioj favoras la disvolviĝon de la ĉina nacia eko-

nomio. De 1979 ĝis 1982, la nombro de la kolektivaj entreprenoj kiuj mem respondecas pri siaj profito kaj deficino leviĝis al 100 000, iliaj produktovaloroj plimultiĝis je 40%, kaj tiu kresko superis la samtempan kreskon de la ŝtataj entreprenoj. La individuaj laborantoj plimultiĝis de 150 000 en 1978 al 2 milionoj en 1982. Ili plejparte okupas sin per metioj, komerca detalado, provizado de manĝaĵoj, riparado kaj aliaj servoj. La individuaj entreprenoj estas kontrolataj de la ŝtato, ili devas observi la diversajn regulojn kaj pagi imposton al la ŝtato. La ĉina kolektiva ekonomio estas unu formo de socialisma posedsistemo, dum la individuaj entreprenoj estas kompletiga parto de la socialisma ekonomio.


Kvankam la produktovaloro de la kolektivaj kaj individuaj entreprenoj konsistigas nur malgrandan parton de la nacia ekonomio, tamen la diversaj malgrandaj komercaĵoj produktitaj

de ili estas bezonataj de la ĉiutaga vivo de la socio. Iliaj servoj multe malpezigis la ŝarĝon de la ŝtato. En Ĉinio ĉiujare ĉ. 3 milionoj da urbaj gejunuloj kaj 20 milionoj da kamparaj gejunuloj devas havigi al si laboron. Estas neeble por la ŝtataj entreprenoj solvi la enlaborigan problemon por ili ĉiuj. Ĉi-flanke la malgrandaj kolektivaj kaj individuaj entreprenoj ludas grandan rolon.

Reguligi la merkaton kaj fari ĝin kompletigaĵo de la laŭplana ekonomio de la ŝtato estas alia rimarkinda trajto de la ĉina ekonomia reformo. En 1982 en la tuta lando aperis pli ol 45 000 foiroj. En 1983 la totala sumo de iliaj plenumitaj negocoj atingis 37 900 milionojn da jŭanoj, t. e. 13.2% de la totala valoro de la sociaj detalaj komercaĵoj. Oni permesas, ke la prezoj de pli ol 350 malgrandaj varoj povas ŝanĝiĝi laŭ bezono de la merkato. La urbaj kaj vilaĝaj foiroj kontentigas la bezonon de la popola vivo per abundaj freŝaj viandoj, kortbirdoj, ovoj, akvoproduktaĵoj, legomoj, sekaj kaj freŝaj fruktoj kaj aliaj varoj.

La ĉinaj gvidantoj foje kaj refoje asertis: La nuna reformo celas serĉi vojon kaj ekonomian formon konformajn al la socialismo de Ĉinio, sed ne ŝanĝi la socialisman sistemon. Kvankam la reformo mem estas revolucio, tamen ĝi nur estas paŝo de mem-reformo kaj memperfektigo de la socialisma ekonomia sistemo. La socialisma publika posedsistemo, laŭplana ekonomio kaj la principo "al ĉiu laŭ lia laboro" estas nepre persistendaj fundamentaj karakterizaĵoj de la socialismo.

La familio de kamparano U Ŭan'u de Siĉŭan-provinco en farado de kolbaso





*Kampanoj de Daĝaj prilaborantaj
sian laŭkontrakte kulturatan kampon*

DAĜAJ HODIAŬ

de TANG JŬANGĴE

“**L**ERNU de Daĝaj en agrikulturo” estis unu el la ofte aŭdataj sloganoj en Ĉinio dum la relative longa periodo ekde la sesdekaj jaroj. Kial ĝi malaperis en la vivo de la ĉina popolo? Kia estas Daĝaj hodiaŭ, montvilaĝeto en Ŝanŝji-provinco? Ĉi-sube ni koncize konigos al niaj legantoj tiujn rimarkindajn problemojn.

Daĝaj estis la ruĝa flago de la agrikultura fronto de Ĉinio pro

sinsekvaj riĉrikoltoj akiritaj post reformado de la sterilaj kampoj. Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj persone resumis ĝian fundamentan sperton, el kiu la plej ĉefa estis la spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj modesta vivado kaj penema luktado.

La sperto de Daĝaj havis aktivan signifon kaj en sia frua periodo vere stimulis la kampanojn de multaj lokoj reformi la malfavorajn naturkondiĉojn en

sia hejmloko. Tamen, influate de la ultra-maldekstra penso en la “kultura revolucio”, Daĝaj ŝanĝis sian politikon, tiel ke multaj el ĝiaj agmanieroj ne plu konformis al la realo de la ĉina kamparo. Ekzemple, ili kulturis sole grenplantaĵojn (ĉefe maizon), nuligis familian parcelon por la kampanoj, kritikis la familian kromokupon kaj la vilaĝan foiron kiel “kapitalisman vojon”, kaj anstataŭe praktikis la egalmezurisman en distribuado, prenis la brigadon kiel bazan kalkulunuon en distribuado malgraŭ la diferencoj en la enspezo de la produktaj taĉmentoj kaj malobservis la principon rekompenci laŭ laborkvoto. Tial la enspezo de la kampanoj ne rekompencis ilian laboron.

Tia sperto estis rifuzita ne nur de la kampanoj de aliaj lokoj en Ĉinio, sed ankaŭ la Daĝajanoj sentis poste, ke tio ne praktikeblas. En 1980 la Daĝaj-a produkta brigado restarigis la financon memstarecon de la produktaj taĉmentoj, kaj rekompenccon laŭ la laborkvoto. En la printempo de 1982 ili dividis la tri produktajn taĉmentojn en 6 laborgrupojn. Tamen la produkta aktiveco de la kampanoj restis ankoraŭ malgranda kaj la grena produktokvanto ne pliiĝis. En la jarfino de 1982 Daĝaj-vilaĝo kun 126 familioj produktis nur 280 000 kilogramojn da greno. Paginte la agrikulturan imposton al la ŝtato, la kampanoj eĉ ne povis solvi la problemon sin satigi.

En januaro de 1983, kiel aliaj vilaĝoj de la tuta lando, ankaŭ Daĝaj praktikis la respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado kaj laŭ difino de la ŝtato distribuis familiajn parcelojn al la kampanoj. Ili ŝanĝis

la metodon kulturi nur grenplantaĵojn, plivastigis la areon de la fruktoĝardenoj, teoĝardenoj kaj aliaj ekonomiaj vegetaloj, re-funkciigis la tradiciajn metiejojn por ĉina misoo, vinagro kaj amelaj vermiĉeloj, kaj nove ekspluatis malgrandan karbominejon, kiu ĉiutage produktas 20 tunojn da karbo.

Ĝja Ĉengĵang, eksbrigadestro, diris: “Ni Daĝaj-anoj ne plu iros la ‘Daĝaj-an vojon’.” Kaj Ĝja Ĉangsŭo, nuna respondeculo de Daĝaj, diris, ke hodiaŭ la produkta aktiveco de la kamparanoj estas tre alta kaj li tute ne bezonas plenvoĉe voki ilin labori en la kampo.

Liberigite el la katenoj, la diligentaĵoj Daĝaj-anoj ekriĉiĝis. En 1983 la kvin-membra familio de Ĝja Ĉangsŭo kontraktis pri duon-hektaro da tero kaj produktis 4 000 kilogramojn da greno. Lia edzino kontraktis pri parcelo da fruktoĝardeno, bredis 3 porkojn kaj en postlaboraj horoj fosis karbon en la malgranda karbominejo. Tiujare lia familio enspezis 2 558 jŭan-ojn (ĉ. 1 300 usonajn dolarojn) post diversaj pagoj. Sed antaŭe, lia familio enspezis maksimume 550 jŭan-ojn por jaro.

En tiu vilaĝeto estas pli ol 170 familioj, kies enspezo kelkoble kreskis same kiel tiu de Ĝja Ĉangsŭo. En 1978 la pokapa jar-enspezo de Daĝaj estis 174 jŭan-oj kaj en 1983 ĝi atingis 570 jŭan-ojn, la totala grena produktokvanto unuafoje superis 500 tunojn kaj la greno, kiun oni donis al la ŝtato kiel agrikulturan imposton, estis 200 tunoj, kiuj superis la difinitan normon.

En la jarfino de 1983, la 126 familioj de Daĝaj elspezis pli ol

50 000 jŭan-ojn kaj aĉetis ĉiu po unu televidilon kaj nemultaj kamparanoj aĉetis aŭtojn kaj traktorojn.

En ŝanĝiĝo de la aŭtarcia kaj duonaŭtarcia produktado al grandskala varproduktado en la kamparo, ankaŭ Daĝaj, influita de la ultra-maldekstra penso, nun trapasas profundan historian ŝanĝiĝon. Pli kaj pli multaj Daĝaj-anoj komprenas, ke la varprodukta disvolviĝo dependas de scioj.

En la domo de la juna kamparano Li Hujming, sur muro estas la merit-atesto donita de la gubernia popola registaro en 1983 por premio lian riĉiĝon per diligenta laboro. Sub la merit-atesto kuŝis “Ĉina Kamparana Ĵurnalo”, “Ŝanŝji-a Kamparana Ĵurnalo” kaj “Ŝanŝji-a Scienc-teknika Ĵurnalo” ktp. El ĵurnalo Li Hujming informiĝis, ke alilokaj kamparanoj multigis sian enspezon dank’ al interplantado de greno kaj legomoj en la kampoj. Li do lernis de ili kaj komencis fari tian plantadon. En 1983 lia familio enspezis ĉ. 2 000 jŭan-ojn, 3-oble pli multe ol en la jaro antaŭ 1983, kiam lia familio enspezis plej multe.

La 28-jara Geng Jinĝu aĉetis pli ol 20 librojn pri kokobredado. Li avida lernis koncernajn sciojn. En 1983 lia familio kontraktis pri 3.6 hektaroj da tero de la kolektivo kaj rikoltis multe da greno. Krom greno por agrikultura imposto kaj nutrado de la familio, restis sufiĉe da greno por breedi kokojn. Nun li bredas 1 000 kokojn.


Hodiaŭ, la Daĝaj-anoj vere iras sur la brila socialisma vojo.



Bovobredisto Ĝja Ĝiŝeng



Specialigita kamparano Li Juming en preparado de vinagro



Liŭ Ĝiming ludas fluton por polaj amikoj.

LIŬ ĜIMING:

Kie vi,

NENIAM mi forgesos la amikecon inter mi kaj miaj polaj esperantistoj, kiu estis stariĝita antaŭ 20 jaroj, kiam mi lernis en Pollando.

En 1964 mi komencis lerni en Pollando. Kutime, antaŭ ol studi en iu alia lando, oni devas lerni la koncernan fremdan lingvon mallongtempe. Tamen, pro malpermeso de la tiamaj cirkonstancoj mi kun kelkaj kolegoj veturis Pollandon sen koni eĉ pollingvajn literojn. En la komenco post kiam ni atingis tiun landon, pro manko de konatoj kaj pro la lingva baro, ni renkontis multajn malfacilojn. Estis ne oportune por ni ĉu en manĝado ĉu en veturado.

Laŭ la aranĝo de la koncerna instanco de Pollando ni komencis lerni en la pollingva fakultato de la Mickiewicz-a Universitato, Poznan, en okcidenta Pollando. Sed pro la lingva baro ni ne povis tuj ĉeesti lecionon kaj ni devis lerni duonjaron unue en la prepara kurso, kie oni instruis al ni pollingvajn literojn. Antaŭ la komenco de la lernado mia kolego kaj mi iris al magazeno por aĉeti skribilojn. En la magazeno vendistino varme salutis nin en la pola lingvo, sed ni ne komprenis ŝin. Poste ŝi demandis nin


en la angla lingvo, ni ankoraŭ ne komprenis ŝin. Inter du homoj, se al ili mankas komuna lingvo, estas longa distanco, kvankam ili staras tre proksime. Sed en la tria fojo, kiam ŝi demandis Esperante: “Kion vi volas aĉeti?”, mi ekĝojis: Ŝi scipovis Esperanton. Tiam Esperanto vere helpis nin. Mi tuj respondis Esperante: “Mi volas saketon.” Tion aŭdinte, ankaŭ ŝi ekĝojis. Fakte ŝi volis nur explore demandi nin en Esperanto, se ne efikis la pola kaj angla lingvoj. Neatendite, ŝi sukcesis en la provo. Ŝi ĝoje diris: “Ĉu vi estas esperantisto?” “Jes,” mi respondis. “Bonege! Kiun koloron vi preferas?” “Brunan.” Ŝi donis al mi brunan. Mi aĉetis ankaŭ inkon, paperpecojn, globkrajonon, kajerojn k.a. Ĉe la disigo ŝi foje-foje esprimis sian deziron vidi nin ofte. Poste ni fariĝis konstantaj klientoj de tiu magazeno.

Iutage, post vespermanĝo, kiam mi promenis antaŭ nia loĝejo, subite mi aŭdis, ke du polaj studentoj salutas unu la alian en Esperanto. Tiam mi haste iris al ili kaj salutis ilin en Esperanto: “Bonan vesperon, amikoj!” Tio mirigis ilin kaj ili unuvoĉe demandis: “Ĉu vi estas esperantisto?” “Jes, sed mi estas komen-

canto.” Kiam ili sciigis, ke mi estas studento el Ĉinio, ili ambaŭ firme premis miajn manojn kaj montris sin aparte intimaj al mi. Esperanto helpis nin en nia interŝanĝo de pensoj kaj kompakte ligis nin ĉiujn. Unu el ili nomiĝis Marek Bielski, kaj la alia Adam Nowrocki. Marek diris: “Ni tre ĝojas konatiĝi kun vi. Vi estas nia unua Esperanta amiko el Ĉinio.” “Esperanto estas internacia komunikilo. Ni ĝin uzu por servi al la internaciismo kaj amikeco,” mi diris. De tiam ni fariĝis bonaj amikoj kaj ofte interparolis Esperante. Mi pensis, ke ĉie en Pollando, la hejmloko de Zamenhof, troviĝas esperantistoj. Mi devis, profitante tiun favoran kondiĉon, bone lerni Esperanton kaj per Esperanto bone lerni la polan lingvon.

Komenciĝis la leciono. Instruisto lernigis al ni la polan lingvon komence de ĝiaj literoj. Ĉar la instruisto ne komprenis hanlingvon kaj ni ne komprenis la polan lingvon, tial ni devigite eklernis vortojn laŭ bildoj aŭ objektoj. En la lernado mi trovis, ke estas multe da komunaj punktoj inter la pola lingvo kaj Esperanto, ekz., estas tre similaj la literaj formoj kaj prononcoj kaj deklinacioj de vortoj. Dank’ al tio mi fundamente posedis la polan

amikoj?



Liŭ Ĝiming en Pollando

lingvon. Pro tio mi ofte rememoris la profesoron, kiu instruis al mi Esperanton enlande. Estis ĝuste li, kiu donis al mi ŝlosilon por lerni la polan lingvon.

Duonjaro pasis. Mi eklernis en la pollingva fakultato de la Mickiewicz-a Universitato la gramatikon de la pola lingvo, polajn literaturon, historion, literaturan historion k.a. La profesoroj kaj docentoj ĉiuj lekciis al ni en la pola lingvo. Al ni mankis lernolibroj, tial ni povis noti nur kion niaj instruistoj lekciis dum lernohoro kaj legi referencajn librojn post leciono. Tiam pro mia malbona aŭdokapablo, mia noto estis nekompleta. Tial, kiam mi havis malfacilojn en lernado, mi ofte min turnis al miaj Esperantaj amikoj Marek kaj Adam por peti de ili helpon kaj ili ĉiam helpis min. Ili faris klarigon al mi ofte en la pola lingvo kaj Esperanto alterne, ĝis kiam mi komprenis ĉion klarigitan.

Helpate de Marek kaj Adam mi konatiĝis kun aliaj esperantistoj. Ni ofte kunvenis, konversaciis Esperante kaj diskutis pri diversaj demandoj. La pola popolo estis tre amika al la ĉina popolo, tre zorgis pri ĉinaj aferoj kaj elkore ĝojis pri ĉiuj niaj atingoj.

Miaj samideanoj helpis min en multaj flankoj. Ili ofte kondukis min kaj aliajn ĉinajn studentojn por rigardi la fizionomion de Poznan, muzeon kaj vidindajn lokojn, konigis al ni polajn morojn kaj rekomendis al ni elstarajn literaturajn verkojn. . . Tiutempe mi tre fieris pri tio, ke mi konatiĝis kun tiuj Esperantaj amikoj.

En la interparolado miaj samideanoj ofte demandis min pri diversaj aferoj de Ĉinio, ekz., kiom da naciecoj havas Ĉinio? kiel iras la ĉina Esperanto-movado? kia profesio estas la plej glora en Ĉinio? Ili demandis min ankaŭ pri edukado, industrio, agrikulturo, naciaj moroj, virinoj, geedziĝo k.a. Mi respondis al ili ĉiam fervore kaj detale. En la naskiĝtago de Marek mi donacis al li unu ekzempleron de EPC zorgeme konservitan de mi. Frumatene de la sekvinta tago li rapidis al mi dirante, ke li unuspire legis ĉiujn artikolojn en ĝi kaj ke antaŭe li konis Ĉinion nur de la historia leciono kaj iom sciis pri Konfucio, ĉinaj imperiestroj, vinditaj piedetoj de ĉinaj virinoj k.a., sed li sciis tro malmulte pri la nova Ĉinio. La revuo helpis lin pli multe koni la novan Ĉinion. Li deziris

lerni hanlingvon kaj viziti Ĉinion, se eble.

Tiel, en la periodo de mia lernado en Pollando polaj esperantistoj kaj mi starigis sinceran amikecon pere de Esperanto. Ĉe la adiaŭo iu diris al mi: "Donu vian adreson al ni, ni deziras ofte korespondi kun vi." Reveninte la patrujon, mi ne skribis al ili pro diversaj kaŭzoj, kaj poste tute neblis komunikiĝi kun ili, ĉar iliaj adresoj estis perditaj. Multaj jaroj pasis, mi ne scias, kiel ili statas nun. Mi tre sopiras al ili kaj multfoje vidis ilin en sonĝo. Nun mi ankoraŭ zorgeme konservas la Esperantajn librojn donacitajn de ili. Mi pensas, ke ili ankaŭ memoras min. Mi bone tenas la nomojn de iuj samideanoj en mia memoro. Ili estas Marek, Adam, Andrzej Wrublewski, Klemens Piskurewicz, Jan Tomczak. Kvankam la nomojn de aliaj polaj amikoj mi jam ne memoras, tamen iliaj ridetaj mienoj ĉiam restas en mia memoro. Kiel forte mi deziras ricevi iliajn leterojn, post kiam ili legos mian artikolon! Mi treege esperas, ke EPC, kiel ponto ree interligos min kaj miajn polajn samideanojn.

Mi tutgorĝe krias: "Kie vi, karaj amikoj? Kie vi?"

S-ino Nancie Durham

— AMIKINO DE LA ĈINAJ ESPERANTISTOJ



*S-ino Nancie (la maldekstra) kaj ŝia edzo
s-ro George (la meza) sur la Granda Muro*

I

Denove venis s-ino Nancie Durham, gvidante la Okcident-Eŭropan Esperantistan Vizit-grupon al Ĉinio.

Mi ankoraŭ memoras ŝian unuan leteron adresitan al la Internacia Vojaĝa Servo de Ĉinio en 1982, en kiu ŝi diris: “Se tiu ĉi vizit-grupo sukcesos en la vojaĝo al Ĉinio, do kreu al mi, ke ĝi ne estos la lasta.” Faktoj

pruvis, ke sendube sukcesis la de ŝi gvidata kvinlanda esperantista vizit-grupo al Ĉinio. Kaj ĉi-jare ŝi aranĝis pli grandan grupon kun esperantistoj el Anglujo, Francio, Nederlando, Svisio, Italio, FR Germanio kaj Danlando. En tiu ĉi grupo troviĝis ankaŭ ŝia edzo G. S. Durham.

S-ino Nancie Durham estas angla esperantistino, ordinara

instruisto de fremdaj lingvoj. Ŝi instruas la rusan, germanan kaj francan lingvojn. Tamen ŝi sukcese organizis plurlandajn esperantistajn vizit-grupojn kaj tiel injektis novan vigecon en la internacian Esperantan movadon. Ŝi estas arĝenthara kaj maldika, sed vigla. Aŭdante ŝian belan voĉon en la Londona Esperanta Ĥoro, precipe la sopranon en la kanto “Esperanto — nia lingvo”, oni simple ne povus kredi ke tio estas la voĉo de pli-ol-sesdekjara virino.

II

“George, ne parolu angle!” ŝi kriis al sia edzo, kiu vigle babilis kun apudsidanta grupano survoje de la Nankina Flug-haveno al la hotelo. “Parolu Esperante, ĉiam kaj ĉie!” — jen ŝia rigora postulo al ĉiuj grupanoj inkl. de ŝia edzo.

Ŝi diris, ke la vizit-grupo havas tri celojn, t.e., diskonigi Esperanton, koni la Esperantan movadon en diversaj lokoj de Ĉinio; havigi al si konon pri la vivo kaj laboro de la ĉinaj popoloj; kaj fine ĝui belecon de ĉinaj pitoreskejoj kaj koni ĝian antikvan civilizacion. Evidente la unua estis la ĉefa, tial la membroj de la grupo estis esperantistoj. Ĉie, kien ili venis, ŝi postulis ke ili kontaktiĝu kun ĉinaj esperantistoj kiel eble plej multe.

Ŝi rigore traktis la veteranajn esperantistojn kaj fervore helpis la komencantojn. Inter la grupanoj estis iu, kiu eklernis nian lingvon antaŭ nur kelkaj monatoj kaj ofte miksis anglajn vortojn en la Esp-konversacio. Nancie ĉiam kuraĝigis ŝin, prezentis ŝin al ĉinaj samideanoj ĉiam kun laŭdoj, ke ŝi lernis diligente kaj progresis rapide. Foje ŝi subite

demandis min: "S-ro Gong, kiel George parolas Esperante?"

"Bone, pli flue ol komence."

"Jes," ŝi diris kun rideto, "ĉi-foje George multe progresis kaj parolas pli kaj pli flue. Tio estas ne ebla, se li ne aliĝus al nia grupo."

III

Verŝajne oni povas diri, ke sino Nancie estas unu el la eksterlandaj esperantistoj, kiuj ĝis nun plej multe kontaktiĝis kun ĉinaj esperantistoj. En la lasta semajno de ilia vojaĝo en Ĉinio la Ĉangŝa-a kaj Uhan-a radiostacioj plurfoje disaŭdigis novaĵojn pri la aktivecoj de tiu ĉi grupo. Tiam Nancie preskaŭ famiĝis en la du urboj.

Kiel laboranto pri turismo mi bone scias la malfacilon por aranĝi plurlandan turisman grupon.

"Nancie, por kio vi organizis la plurlandan esperantistan vizit-grupon al Ĉinio?" mi demandis ŝin en la lasta tago de ilia vojaĝo.

"Kial vi elmetis tiun demandon?"

"Ĉar via grupo estas ne ordinara kaj organizi ĝin estas malfacile."

"Jes, tio estas vero," post paŭzo ŝi respondis. "La malfaciloj estas multaj, sed pensante pri la sincera amikeco de la ĉinaj samideanoj, mi sentas, ke ĉio estas ne grava."

Ŝi rakontis al mi la viziton de ŝi kaj ŝia edzo al Ĉinio en 1979. La amikeco kaj entuziasmo de ĉinaj esperantistoj forte kortuŝis ŝin. Tiam ŝi jam decidis aranĝi esperantistan vizit-grupon al Ĉinio. Ŝi realigis sian deziron

post tri jaroj. Ŝi nun sukcesis refoje. Ŝi diris al mi, ke la ĉinaj esperantistoj aktive kaj fervore lernas kaj diskonigas Esperanton sub malfavoraj kondiĉoj, ke al ili mankas lernolibroj kaj instruistoj, kio ege emociis ŝin. Ŝi ĝojas, ke tiel multe da gejunuloj en Ĉinio lernas Esperanton. Ŝi diris, ke pli kaj pli maljuniĝis la esperantistoj en la Okcidento.

La 10-a de majo estis la lasta tago de la grupo en Ĉinio. Antaŭtagmeze la grupanoj prome-

nis en la bela Bejhaj-parko. Estis frusomera tago baniĝanta en la sunlumo. Nancie surgrimpis la Blankan Pagodon, dorsportante sakon kun verda stelo. Ŝi direktis sian rigardon foren al la ondetanta verda lago, ore brilaj palacaj konstruaĵoj de la Malpermesita Urbo kaj novaj domegoj en malproksimo. Zefiro taŭzis ŝiajn arĝentajn harojn. . .

Pri kio ŝi meditis? Ĉu pri aranĝo de la tria plurlanda esperantista grupo al Ĉinio?



S-ino Nancie kaj ĉinaj esperantistoj

La aŭtoro (la plej maldekstra), ĉiĉerono de sino Nancie k.a. en ekskurso en Hangĝou



Esperanto kaj filatelo

Antaŭ longa tempo ni ricevis ĉi tiun interesan artikolon de s-ano Piet Berkhout el Nederlando. Por pli kompletigi la enhavon de la artikolo ni serĉadis koncernajn Esperantajn poŝtmarkojn por publikigi kune kun ĝi. Pro tio ni prokrastis la publikigon. Estas feliĉe, ke antaŭ nelonge ni akiris fervorajn helpojn de ĉinaj filatelitoj Song Ŝengtan kaj Ĝu Zuŝej, kiuj pruntedonis al ni plejparton de la E-poŝtmarkoj menciitaj en la artikolo. Nun ni publikigas ilin sur la dorskovrilaj paĝoj.

Nin surprizis malfeliĉa informo lastatempe, ke s-ro Piet Berkhout, la verkinto de ĉi tiu artikolo forpasis la 13-an de decembro, 1983, en sia 70-jara aĝo. Ni esprimas nian koran kondolencon al liaj familianoj.

La Red.

Kiam mi estis membro de poŝtmark-unuiĝo de Assendelft kun la nomo "De Postduif" (La Poŝtkolombo) antaŭ 17 jaroj, la estraro instigis min: "Kolektu poŝtmarkojn pri Esperanto." Kaj mi konsentis.

Sed aperis antaŭ mi tuj la grandaj demandoj: Kiuj landoj emisiis poŝtmarkojn pri Esperanto kaj kiel akiri ilin?

En iu Esperanto-revuo mi trovis, ke organiziĝis klubo en Ameriko nomita "EKIK" (Esperanta Kolektanta Internacia Klubo), mi tuj aniĝis. Poste mi fariĝis ankaŭ membroj de bulgara klubo "Amika Rondo" kaj "ELF-AREK" (Esperanto-Ligo Filatelista — Amika Rondo de Esperantaĵo-Kolektantoj), faka organizaĵo de Universala Esperanto-Asocio. La lasta eldonas kvarfoje jare informilon "La Verda Lupeo-Fenikso", kaj krome ankaŭ katalogojn pri Esperanto-poŝtmarkoj, poŝtaj Esperanto-stampoj k.a. En la revuoj kaj

katalogoj de la supre menciitaj Esperantaj filatelaj organizaĵoj mi informiĝis, ke Esperantaj poŝtmarkojn emisiis jenaj landoj:

SOVET-UNIO

La unua serio de poŝtmarkoj kun Esperanta teksto estas emisiita por memori la 20-an datrevenon de la forpaso de A. S. Popov — fama rusa fizikisto kaj inventinto de radio. La poŝtmarkoj estis publikigitaj en oktobro de 1925 kun du kostoj: 7 kopekoj en blua koloro kaj 14 kopekoj en verda koloro. Estis presita sur ambaŭ poŝtmarkoj Esperanta teksto: "Inventisto de radio". (vd. la bildojn 1 k 2)

En la jaro 1926 okazis en Leningrado la 6-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda. Por tiu okazo la sovetunia poŝtofiĉejo emisiis du poŝtmarkojn (en kostoj de 7 kaj 14 k.) kun la literoj "SAT" kaj la Esperanta teksto "VI Internacia Proletaria

Esperanto-Kongreso". (vd. la bildojn 3 k 4)

Por celebri la 40-an datrevenon de Esperanto la sovetunia poŝtofiĉejo emisiis en la jaro 1927 poŝtmarkon kun kosto de 14 k. Ĝi portas grandliteran vorton "ESPERANTO", verdan stelon kaj portreton de Zamenhof kun Esperanta teksto "Aŭtoro de Esperanto D-ro L. L. Zamenhof". (vd. la bildon 5)

En la sama jaro la sovetunia poŝtofiĉejo eldonis ankaŭ du kostoŝanĝitajn poŝtmarkojn sur Esperantaj poŝtmarkoj, t. e. ŝanĝi en 8-kopekajn la 7-kopekan memorfestan poŝtmarkon por A. S. Popov kaj la 7-kopekan memorigan poŝtmarkon por la 6-a Kongreso de SAT. (vd. la bildojn 6 k 7)

En la jaroj 1929 kaj 1932 la sovetunia poŝtofiĉejo emisiis du poŝtmarkojn de 3 rubloj kaj 1 rublo kun Esperantaj tekstoj "Vollhof-HES je la nomo Le-

nin" (HES: Hidro-Elektra Stacio) kaj "Centra Telegrafo-Moskvo". (vd. la bildojn 8 k 9)

BRAZILIO

En la jaroj 1935 kaj 1936 la brazila poŝtofiĉejo emisiis du poŝtmarkojn (kostoj de ambaŭ estas 200 Rs.) kun Esperantaj tekstoj: "Oka Internacia Specimena Foiro" kaj "IX Internacia Specimena Foiro". (vd. la bildojn 10 k 11)

La brazila poŝtofiĉejo emisiis en januaro de 1937 poŝtmarkon en kosto de 300 Rs. La poŝtmarko portas Esperantan tekston "Naŭa Brazila Kongreso de Esperanto". (vd. la bildon 12)

Por celebri la 50-jaran jubileon de Esperanto (1887-1937), en la sama jaro brazila poŝtofiĉejo emisiis poŝtmarkon (en kosto de 300 Rs.) kun Esperanta teksto "Ora Jubileo de Esperanto". (vd. la bildon 13)

En la jaro 1945 estis emisiita dupeca poŝtmarko-serio kun Esperanta teksto "Deka Brazila Kongreso de Esperanto". Sur la poŝtmarkoj estas malsamaj bildoj: bildo de diino kun verda stelo en la manoj (en kosto de 40 Cts.) kaj portreto de D-ro

Zamenhof (en valoro de 1.20 Crs.). (vd. la bildojn 14 k 15)

Por memori la 100-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof la brazila poŝtofiĉejo emisiis en komenco de 1960 poŝtmarkon kun portreto de D-ro Zamenhof. (vd. la bildon 16)

La 66-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en 1981 en Brazilo kaj por tiu okazo la brazila poŝtofiĉejo emisiis memorigan poŝtmarkon kun verda stelo. (vd. la bildon 17)

BULGARIO

En la jaro 1947 la bulgara poŝtofiĉejo emisiis Esperantan poŝtmarkon en valoro de 20+10 levoj. La poŝtmarko surhavas mapon, verdan stelon kaj Esperantajn vortojn "1887 Esperanto 1917" kaj "30 Jubilea Kongreso 1947". (vd. la bildon 18)

Okaze de "50 Jaroj de Bulgara Esperanto-Asocio" kaj "70 Jaroj de Esperanto" emisiigis en la jaro 1957 poŝtmarko kun portreto de D-ro Zamenhof. (vd. la bildon 19)

En la jaro 1959, por memorigi la 100-an datrevenon de la

naskiĝo de D-ro Zamenhof la bulgara poŝtofiĉejo emisiis poŝtmarkon kun portreto de D-ro Zamenhof. (vd. la bildon 20)


Por celebri la 35-an bulgaran Esperanto-kongreson (14-16 jul. 1962) la bulgara poŝtofiĉejo surpris sur la Esperanta poŝtmarko de 1957 tekston "XXXV Kongreso" en la bulgara lingvo kaj ŝanĝis la valoron de 44 st. en 13 st. (vd. la bildon 21)

Okazis la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio dum 3-10 de aŭgusto, 1963 kaj la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en Varna de 29 de julio ĝis 5 de aŭgusto, 1978. Por celebri la Esperantajn kongresojn la bulgara poŝtofiĉejo emisiis du poŝtmarkojn kun Esperantaj tekstoj "48-a Universala Kongreso de Esperanto" kaj "63-a Universala Kongreso de Esperanto". Ambaŭ poŝtmarkoj surhavas klaran verdan stelon kun litero "E" en la centro. (vd. la bildojn 22 k 23)

AŬSTRIO

En la jaro 1949, por memorigi la Esperantistan kongreson en Graz la aŭstra poŝtofiĉejo emisiis poŝtmarkon kun vorto "ESPERANTO" kaj verda stelo. (vd. la bildon 24)

En la jaro 1954, por memorigi la 50-an datrevenon de la aŭstra Esperanto-movado, la aŭstra poŝtofiĉejo emisiis poŝtmarkon de 1 ŝilingo kun verda stelo kaj Esperanta teksto "50 jaroj Esperanto-movado en Aŭstrio". (vd. la bildon 25)



*Esperantaj poŝtkarto
kaj unuataĝaj kovertoj*

JUGOSLAVIO

La 38-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en la urbo Zagrebo de Jugoslavio. Por celebri la kongreson la jugoslava poŝtofiĉejo emisiis en la jaro 1953 du belajn Esperantajn poŝtmarkojn en kostoj de 15 kaj 300 dinaroj. Unu el la poŝtmarkoj surhavas Esperantan tekston "38-a Universala Kongreso de Esperanto" kaj la alia verdan stelon super flagoj de diversaj landoj. (vd. la bildojn 26 k 27)

Krome en duona parto de la urbo Triësto, tiam okupata de jugoslava armeo, la poŝtmarkoj estis vendataj kun surprisitaj literoj "STT VUJNA". Tio signifas: Militista okupado de jugoslava armeo de libera urbo Triësto.

HUNGARIO

En la jaro 1957, por celebri la 70-an datrevenon de Esperanto, la hungara poŝtofiĉejo emisiis serion el du Esperantaj poŝtmarkoj kun malsamaj bildoj: bildo de du personoj interparolantaj en la internacia lingvo Esperanto kaj bildo de portreto de D-ro Zamenhof. (vd. la bildojn 28 k 29)

En la jaro 1962 la hungara poŝtofiĉejo emisiis poŝtmarkon memorigan al la 14-a Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) okazanta en Budapeŝto. (vd. la bildon 30)

En la jaro 1983, okazis en Budapeŝto la 68-a Universala Kongreso de Esperanto kaj por tiu okazo la hungara poŝtofiĉejo emisiis Esperantan poŝtmarkon en kosto de 2 Ft. La poŝtmarko portas Esperantan tekston "68-a Universala Kongreso de Esperanto", verdan stelon kaj ver-

dajn literojn "UK". (vd. la bildon 31)

POLLANDO

En la jaro 1959, por memorigi la 100-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, la pola poŝtofiĉejo emisiis serion el du poŝtmarkoj. Unu el ili en kosto de 60 gr. portas portreton de D-ro Zamenhof kaj Esperantan tekston "L. L. Zamenhof Aŭtoro de Esperanto", kaj la alia en kosto de 1.50 Zl. portas verdan stelon kaj Esperantan tekston "1959 — Jubilea Jaro de Zamenhof" (vd. la bildojn 32 k 33)

ĈEĤOSLOVAKIO

En la jaro 1961 en Prago okazis tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj. Por tiu okazo ĉeĥoslovaka poŝtofiĉejo emisiis poŝtmarkon kun Esperanta teksto "Tutmonda Ekspozicio de Poŝtmarkoj". (vd. la bildon 34)

SVISLANDO

Por celebri la 64-an Universalan Kongreson de Esperanto en Lucerno de Svislando en 1979, la svisa poŝtofiĉejo emisiis Esperantan poŝtmarkon kun vorto "Esperanto" kaj verda stelo sur aerostato kaj Esperanta teksto "64-a Universala Kongreso de Esperanto" (vd. la bildon 35)

BELGIO

La 67-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en 1982 en Antverpeno de Belgio. Por celebri la kongreson la belga poŝtofiĉejo emisiis Esperantan poŝtmarkon kun vorto "Esperanto" kaj verda stelo. (vd. la bildon 36)

Pere de Esperantaj revuoj kaj katalogoj pri Esperantaj poŝt-

markoj k. a. mi informiĝis ankaŭ, ke okaze de internaciaj kaj naciaj Esperantaj kongresoj, kaj ĉe memorigaj tagoj de Esperanto kaj de D-ro Zamenhof, la poŝtofiĉejoj de kelkdek landoj emisiis kelkcent poŝtkartojn kaj kovertojn kun Esperantaj tekstoj kaj stampoj. Tiaj poŝtkartoj kaj kovertoj, samkiel poŝtmarkoj, estas valoraj kolektaĵoj por esperantistoj-filatelistoj.

Por akiri Esperantajn poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj kovertojn, en daŭro de 17 jaroj mi korespondis kaj interŝanĝis kun filatelistoj de preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo kaj riĉe rikoltis.


Mi pensas, ke esperantistoj-filatelistoj indas kolekti ankaŭ:

Poŝtmarkojn kun portretoj de ŝtatestroj, verkistoj kaj aliaj eminentuloj, kiuj aprobas kaj alte taksas Esperanton;

Poŝtmarkojn kun portretoj de verkistoj, kies verkaĵoj estis tradukitaj en Esperanton kaj

Poŝtmarkojn kun portretoj de verkistoj, kiuj verkis rekte en Esperanto.

Tiele, la esperantistoj-filatelistoj povas multe pli riĉigi sian kolekton kun la temo "Esperanto" kaj per tio efike propagandii nian lingvon.





Armeaj medicinistinoj faras dommastrumadon por senhelpaj gemaljunuloj.

MORALAJ AGOJ DE JUNULOJ


Fotoj de ŜJE DONGŜENG kaj HAŬ JŬANĜENG



Junuloj kaj maljunuloj kune preparas manĝaĵojn.





Senhelpaj gemaljunuloj kaj kvar knabinoj, kiuj laŭvice prizorgas ilin



Kuracistino regule ekzamenas la korpon de maljunuloj en maljunulejo.

Maljunulino akompanata de junuloj en vizito de lamaejo

Junuloj transportas karbon por maljunulino.






Kampanarino Ŝjong Ju-ŝiŭ estas laŭdata kiel bona bofilino kaj modelo de prizorgado al maljunuloj.

Sunumado de litaĵoj en maljunulejo



Soldatoj razas al maljunuloj.



ESTABLIGO DE LA PREPARA GRUPO DE LIŬĜOŬ-A ESPERANTO-ASOCIO

En majo ĉi-jare, la nomita grupo establiĝis en la urbo Liŭĝoŭ de la Ĝuangŝji-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. Ĝi konsistas el sep personoj.

En la urbo ĉ. 500 homoj lernas Esperanton. Nuntempe tie funkcias kvin Esperantaj kursoj. Meze de majo la Liŭĝoŭ-a ĵurnalo dufoje raportis pri la Esperantaj kursoj.

ESPERANTA ORGANIZO EN ALTLERNEJOJ

La 31-an de majo fondiĝis la Esperanta Asocio de la Ĝeĝjang-a Politeknika Instituto en la pitoreska urbo Hangĝoŭ. Profesoro Deng Hanŝin, estro de la instituto, estis elektita kiel honora prezidanto de la asocio. En la inaŭguro li kuraĝigis la ĉeestantojn diligente lerni, uzi kaj disvastigi Esperanton.


Inaŭgura Kunveno de Esperanto-Asocio de Ĝuangŝji-a Instituto por Nacioj



La 10-an de junio ĉi-jare okazis la fond-kunveno de la Esperanta Asocio de Ĝuangŝji-a Nacimalplimulta Instituto. Ĝi estas la unua Esperanta organizo en la altlernejoj de la Ĝuangŝji-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. La kunvenon ĉeestis pli ol 70 personoj. Ĉjaŭ Ŝjaŭĝuang, veterana esperantisto kaj ĉefa respondeculo de la aŭtonoma regiono, honoris la kunvenon per sia ĉesto kaj faris paroladon esperante, ke kiel eble plej frue fondiĝos la Esperanta Asocio de Ĝuangŝji-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono por disvolvi Esperantan movadon en la regiono. Post la kunveno la tieaj televida kaj disaŭdiga stacioj kaj ĵurnalo tuj informis pri ĝi.

ESPERANTO-KURSO POR SCIENCISTOJ KAJ TEKNIKISTOJ

En la dua tagdeko de junio ekfunkciis la 3-a Esperanta kurso por sciencistoj kaj teknikistoj aranĝita de la Esperanta Asocio de Ĝuangŝji-a Trafika Departamento. Ĝin vizitas 32 inĝenieroj, asistaj inĝenieroj kaj teknikistoj el ok urboj kaj unu gubernio de la regiono.



Esperanto-ekspozicio en la biblioteko ĉe Murdoch-universitato de Aŭstralio

ESPERANTO-KURSO EN ĈANGĜOŬ-A ALTLERNEJO

Nun la Ĉangĝoŭ-a Eduka Instituto funkciigas Esperantan kurson, kiun vizitas 40 mezlernejaj instruistoj, sciencistoj, teknikistoj kaj kuracistoj. La kurson gvidas Ĝang Ĝenĝi, vicestro de la instituto. Post la unua kurso tuj sekvis la dua de februaro ĝis julio.

TEATRAĴO PRI ESPERANTO EN LA BRITA TELEVIDO

La 27-an de majo la brita televida kanalo BBC2 elsendis je 19h15 sepdek-minutan teatraĵon pri Esperanto en la temo "High Hopes" (Altaj esperoj), verkita de Jill Hyem. En ĝi rolis pluraj vaste konataj britaj geaktoroj.

Lastatempe oni pli kaj pli ofte menciis Esperanton en britaj programoj kaj britaj elsendoj de tempo al tempo petis informojn de Esperanto-organizaĵoj.

Sur la bazo de 5-lingva komputika vortaro (Budapest 1972) kaj de normo 7SO 2382 nun prepariĝas eldono de angla-Esperanta kaj Esperanta-angla komputika vortaro. Jam diskutebla estas la unua parto (literoj A ĝis M). Tiuj kiuj deziras kunlabori per kritikoj kaj proponoj pri la tradukoj de la unua parto povas peti senpagan kopion de la unua provizora parto de Christian BERTIN CCETT AIS rue du Clos Courtel B.P. 59 F-35510 CESSON-SEVIGNE (Francio). La eldono de tiu vortaro estas planita por la fino de la jaro.

LA DUA INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO

De la 30-a de marto ĝis la 6-a de aprilo, 1985 (Paskaj Ferioj), la Provenca Esperanto-Federacio organizos en Mico de Francio la Duan Internacian Esperanto-Semajnon kun kvin diversgradaj kursoj matene, ekskursoj posttagmeze, kulturaj kaj distraj vesperoj.

INFORMOJ EL AŬSTRALIO

(1) Ses-semestra Esperanto-kurso estas funkciigata kiel parto de la diplomo pri instruado en Mt. Lawley sekcio de la Okcidenta Aŭstralia Kolegio de Altgrada Edukado. Por informoj konsultu Dron Ian Malcolm de Mt. Lawley sekcio de la menciita kolegio.

(2) En Perth de okcidenta Aŭstralia Esperanto estas, la unuan fojon, enkondukita en triaranga (terciara) instituto. 23 studentoj aliĝis al trijara Esperanto-kurso kaj post diplomiĝo ili rajtos instrui en lernejoj.

(3) La Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralia venkis en la Esperanta dram-konkurso, okazigita en kadre de la Nacia Esperantokongreso en Kanberra. Delegitoj en Japanio, Britio, Finnlando kaj Usono partoprenis en la kongreso kaj diskutis en seminarioj pri la

Fondita la Sciencista kaj Teknikista

Esperanto-Asocio sub la Ĉina

Akademio de Sciencoj en Pekino

LA 15-an de junio 1984, fondiĝis la Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio, kies inaŭguron ĉeestis ĉ. 80 esperantistoj kaj Esperantaj subtenantoj. La asocio havas la celon unuiĝi kaj vaste komunikiĝi kun sciencistoj kaj teknikistoj de Ĉinio; lerni, disvastigi kaj studi Esperanton; apliki ĝin en la sciencoj kaj teknikoj; kaj tiamaniere pli vaste interfluigi sciencojn kun diverslandaj sciencistaj kaj teknikistaj rondoj.

Famaj geografo Liŭ Dongŝeng, glaĉerologo Ŝi Jafeng, paleontologo Ĝou Mingĝen, Jang Minhŭa, eksvicestro de la Instituto por Administraj Kadroj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, Tu Ŝujan, estro de la Kibernetika Instituto sub la Pekina Ferŝtala Instituto, estis elektitaj kiel konsilantoj de la asocio; Meng Gŭangbin, vicestro de la Instituto por

Administraj Kadroj, kiel ĝia prezidanto; Oŭjang Ŭendaŭ, Jin Jifu, Ŝen Ĉengĵu, Lŭo Ŝiming kiel ĝiaj vicprezidantoj; kaj Ŭang Juĉun kiel ĝia ĉefsekretario. Krome oni elektis 14 membrojn de la konsilantaro.

Post sia fondiĝo la asocio estis preta akcepti novajn membrojn en la tuta lando, funkciigi diversajn Esperanto-kursojn por fari preparojn al la 71-a Unversala Kongreso de Esperanto okazonta en Pekino en 1986.

La asocio esperas, ke esperantistoj kaj Esperantaj organizoj de ĉiuj landoj subtenos ilian aktivadon, se eble, donacos al ili Esperantajn gazetojn kaj materialojn sciencajn kaj teknikajn. Ili anticipu dankas ĉiujn helpantojn.

Bonvolu skribi al: S-ro Ŭang Juĉun, P.O. Kesto 2148 (n-ro 73, Yi Lou), Beijing, Ĉinio.

Esperanta literaturo kaj ĝia utiligo kiel internacia lingvo por interkomunikado.

ESPERANTISTA KONGRESO DE FRANCIO

De la 9-a ĝis la 11-a de junio okazis la 76-a Nacia Kongreso de

la Francaj Esperantistoj en Bourges. Ĝin partoprenis pli ol 150 esperantistoj kaj pluraj eksterlandanoj el 8 diversaj nacioj. La kongreso voĉdonis por la repropo de la leĝo por enlistigo de Esperanto inter la nedevigaj studobjektoj en duagrada lernejoj kaj universitatoj.

KIEL KONKERI LA KORON DE NEESPERANTISTOJ?


de V. K.

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵojn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekomencas pro la kontribuoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.

ESPERANTO IN THE MODERN WORLD (ESPERANTO EN LA MODERNA MONDO) kolekto de studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj kaj Esperanto, kompilita de Rudiger kaj Wilma Sindona Eichholz. Eldonita de Esperanto Press. Formato: 15 × 21 cm. 600 p. bindita. Prezo: \$ 25.00 sed nur 15.00 por biblioteko en la tria mondo.

“Esperanto en la Moderna Mondo”



Mendebila ĉe la eldonejo (Bailieboro, Ontario, Canada, KOL 1BO).

La kompilintoj asertas, ke “la pli granda plimulto de la homoj, kiuj trairis la ĉi-tiean (t. e. la Kanadan) edukon sistemon, tute ne scias, kio estas Esperanto”. Kiel do oni konkeru la koron de la neesperantistoj? Per tiu ĉi ampleksa verko ges-roj Eichholz volas prezenti al ili lingvajn problemojn en internacia komunikado kaj la idealan solvon per apliko de Esperanto, konigi al ili la internacian lingvon, ĝian kreinton d-ron L. L. Zamenhof kaj ĝian historion, montri al ili la edukon valoron de Esperanto-lernado kaj la taŭgecon de Esperanto kiel pontlingvo, doni informojn pri la aktuala Esperanto-movado kaj sciojn pri la praktika uzado de Esperanto en diversaj kampoj, kaj ekspone specimenajn paĝojn el libroj kaj gazetoj en Esperanto. Por sia celo, la kompilintoj elektis por sia libro dekojn da artikoloj verkitaj de Humphrey Tonkin, William Auld, Ivo Lapenna, Claude Piron, John Francis, Bruce Sherwood, Tibor Sekelj, Amadoŭ-Mahtar M’Bow, Majorie Boulton, Flora Szabo-Felso k. a. eminentaj esperantistoj kaj aktivuloj en internaciaj aferoj. Jen la titoloj de parto de la verkoj:

La lingva problemo en internaciaj rilatoj

Lingva egaleco en internacia kunlaboro

Justa dulingvismo por Kanado

La lingva problemo de la Nealianca Movado kaj ĝia ebla solvo.

Mito kaj fakto pri Esperanto

Bazaj faktoj pri la internacia lingvo

Esperanto kaj ĝia kreinto

La 16 reguloj de Esperanto

La grandeco de d-ro L. L. Zamenhof

Letero de Zamenhof pri la origino de Esperanto

Integro kaj latentoj en la verko de Zamenhof

La internacia lingvo kiel belarta tradukilo

La eduka valoro de Esperanto-lernado

Internacia turismo de la parolantoj de Esperanto

Esperanto en radio

Ĉar la libro estas destinita por anglalingvanoj, preskaŭ ĉiuj ĝiaj artikoloj estas skribitaj en la angla lingvo aŭ tradukitaj en la anglan kaj metitaj apud la originalo por komparo. Ĝin foliuminte mi konstatis, ke ĝi estas taŭga propagandilo pri Esperanto ne nur por Kanado kaj aliaj anglalingvaj landoj, sed ankaŭ

por aliaj partoj de la mondo, ĉar ĝia riĉa kolekto de materialoj donas sufiĉe klaran bildon pri la problemo de internacia lingvo.

Kiam alproksimiĝas la centjara jubileo de Esperanto, la adeptoj de la internacia lingvo ja devas fari pli energiajn klopodojn por konkeri la koron de la neesperantistoj kaj antaŭenpuŝi nian aferon al triumfo. Por venki la skeptikulojn, ni bezonas diversajn propagandilojn. La rapida disvendiĝo de ĉ. 30 000 ekzempleroj de la centpaĝa ĉinlingva broŝuro "Ĉu Vi Scias Esperanton" en Ĉinio montras, ke propagandilo simila al la tradicia ŜLOSILO ankoraŭ estas bezonata kaj povas ludi pozitivan rolon en disvastigo de Esperanto. Tamen ĝi ne sufiĉas por konkeri la koron de la sensciuloj de Esperanto. Vere bona estas la ampleksa "Esperanto en la Moderna Mondo". La apero de ĝi kaj "Esperanto en perspektivo" estas ĝojinda signo pri la progreso de la por-Esperanta laboro. Kredeble kreiĝos ankoraŭ pli taŭgaj propagandiloj pri Esperanto okaze de ĝia centjara jubileo. Oni povus eldoni serion da propagandaj broŝuroj pli detale traktantaj la temojn en "Esperanto en la Moderna Mondo", prenante tiun ĉi verkon kiel bazon.

NOVE RICEVITAJ LIBROJ
VIVEROJ kolekto de rakontoj de Castela, el la galega tradukis Fernando de Diego, eldonita de Esperanto-kurso de la Instituto por Lingvoj ĉe la Filologia Fakultato de la Universitato de Santiago de Compostela. Formato: 15 × 21.5 cm. 44 p. Prezo ne montrita.

OFICIALA SITUACIO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO EN LA MONDO ĝisdatigita eldono de la verko kompilita de Germain Pirlot. Formato: 15 × 21 cm. 18 p. mimeografita.

LA MORTA SUITO biografio verkita de Miyamoto Masao, eldonita de L' Omnibuso, mendebila ĉe la Japana Esperanta Librokooperativo (Toyonaka-si, Sone-higasi 1-11-46-204 561 Japanio). Formato: 15 × 21 cm. 170 p. Prezo: 25 gld.

LA ISLAMA RESPUBLIKO de Philipp W. Fabry, trad. Reinhard Haupenthal. **JUBILEA ELDON-SERIO V. Scienco 1.** Formato: 14.5 × 20.5 cm. 36p. Prezo ne montrita.

SUGESTOJ POR KOMPLETI-GO DE LA JURA/DIPLOMATIA TERMINARO de d-ro Ladislao Dubravszky kun antaŭparolo de prof. d-ro Ivo Lapenna, eldonita de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Forma-

to: 16 × 22 cm. 28 p. Prezo ne montrita.

VORTARO ESPERANTO-SVAHILA de Jan Knappert, eldonita de Universala Esperanto-Asocio. Formato: 11 × 18 cm. 130 p. Prezo 13.5 gld.

ESPERANTO lernolibro por svahillingvanoj verkita de Nino Vessella, eldonita de Universala Esperanto-Asocio. Formato: 15 × 21 cm. 56 p. Prezo: 9 gld.

ELPAFU LA SAGON poemaro de diverskulturaj popoloj kolektita de T. Sekelj. Formato: 15 × 21 cm. 187 p. Prezo: 27.00 gld. plus sendkosto.


AKADEMIAJ STUDIOJ 1984 kolekto de pri-Esperantaj artikoloj kompilita de s-ro Rudiger Eichholz. Eldonita de Esperanto Press. Formato: 21 × 29 cm. 138 p. Prezo: US\$ 6.60 plus \$ 1.50 por sendkosto.

AJN poemaro de Jarlo Martel-Monto eldonita de la aŭtoro. Formato: 28 × 28 cm. 148 p. Prezo ne montrita.


SUR LA BORDO fantazia romano de Nevil Shute, tradukita de K. G. Linton, eldonita de AEA en 1983. Formato: 14.5 × 21 cm. 254 paĝoj. Prezo: gld. 27.00 aŭ A\$ 10.00. Mendebila ĉe UEA, aŭ rekte ĉe Libroservo de AEA, P. O. Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

SPORTAJ KARIKATUROJ

Trejnisto kaj liaj trejnatoj
de SUN ĜINGZENG



Profund-spira ekzerco
de LIN ĜJILING



KURACAJ VINOJ DE ĈINIO



Kuracaj kaj tonikaj vinoj produktitaj de Tongjintang

de ĜJA IJEN kaj PANG HE

EN la ĉina popolo cirkulas mito simila al tiu pri Prometeo, kiu ŝtelis de Zeŭso la fajron kaj donacis ĝin al la homaro:

“Antaŭ tre tre longe ok feoj en la mirlando, por doni al la homaro rejunigajn florojn, transveturis la Orientan Ĉinan Maron kaj faris malfacilan luktadon kontraŭ la diabloj, kiuj intencis rabi de ili la florkorbon. Ili lerte venkis la diablojn kaj disŝutis la florojn en la homan mondon.”

La mito montris la ardan deziron de la ĉina popolo por longa vivo. Kompreneble en la mondo troviĝas nenia rejuniga floro. Sed dum longtempa batalado kontraŭ malsanoj la ĉina popolo faris specialan kuracan vinon, kiu, kvankam ne rejuniga, povas longigi la homan vivon.

Por prepari kuracan vinon, oni maceras drogherbojn en vino aŭ prenas beston aŭ mineralon kiel materialon. Diversaj kuracaj vinoj faritaj el malsamaj drogoj laŭ malsamaj receptoj povas kuraci aŭ preventi malsanojn aŭ fortigi la sanon.

Estas multaj specoj de ĉinaj kuracaj vinoj. Laŭ klinika bezono oni dividas ilin en vinojn tonikan, menstru-reguligan, traumat-kuracan, reŭmatism-kuracan, malvarm-forigan kaj sang-cirkulado-faciligan.


La kuraca vino, kia “Ok-fea Vino”, nomita laŭ la supre menciitaj feoj, estas preparita el jenaj ok drogoj: akonito, norda akonito, angeliko, zingibro, bambufolio, mento, glicirizo kaj oranĝŝelo, maceritaj en vino. Ĝi havas bonan kuracefikon sur hemiplecion kaj kolapsiĝon de membroj, kaŭzitajn de cerba hemoragio, kaj artralĝion, ostan kaj muskolan doloron kaj neflek-siĝon de membroj, kaŭzitajn de malvarmo kaj malsekeco.

La tonika vino, kia “plezuriga eliksiro”, estis farita de kortegaj kuracistoj de Ĉingdinastio speciale por preventi malsanojn de imperiestro kaj prokrasti lian maljuniĝon. Ĝi estas delikate pretigita kaj servas kiel bonkvalita kaj altefika tonikaĵo. Ofta trinkado donas sufiĉan sangon kaj plenan energion, faras la harojn kaj barbon nigraj kaj la korpon facilmovi.

Kial ĝi havas tiel mirindan efikon? Ĉar vino mem povas vigligi la sango-cirkuladon, preventi malvarmon, forigi malsekecon, delikatigi la haŭton, stimuli la cirkuladon de sango, malstreĉi la muskolojn kaj artikojn kaj akceli digestadon, kaj enkonduki medikamenton en la internajn organojn kaj kanalojn de la organismo. Se oni trempas tonikajn kaj kuracajn drogher-

bojn en vino, ili fariĝos pli tonikaj pli sendolorigaj. La vino kaj la drogherboj kune plifortigas la kuracefikon. Ni prenu kiel ekzemplon reŭmatism-kuracan vinon. La vino mem povas forigi malsekecon kaj kvietigi doloron kaj ankaŭ akceli asimiladon de medikamento far la stomako kaj intesto, dum la medikamento, dank’ al la sangocirkulado akcelita de la vino, rapide trakuras la tutan korpon kaj fariĝas multe pli efika. La eksperimento de la moderna medicino montris, ke multe da efikaj elementoj de drogherboj estas malfacile solveblaj en akvo, sed facile en vino, tial efikaj elementoj de kuraca vino estas pli multaj ol tiuj de dekoktaĵo.

En vinfarejo de Tongjintang de Pekino



En diversaj lokoj de Ĉinio oni produktas tiajn vinojn, ekz. ginsenga kaj cervokorna vinoj de nordorienta Ĉinio, tigrosta vino de Pekino, vino de akantopana-ka radikŝelo de Tjanĝin, tigrost- cidonia vino de Ŝanhajo, vino “Longvivulo Ĝoŭ” de Fuĝjan, eliksiro de Langoŭ ktp.

La kuraca vino estas simple farita kaj facile konservebla. Tial ĝi estas tre ŝatata en Ĉinio. Laŭ sia sanstato oni faras diversajn kuracajn vinojn. Tiuj homoj, kiuj ne havas sufiĉan energion kaj estas malfortaj, povas trinki vinon kun maceritaj ginsengo, dangŝeno (*Codonopsis pilosula*) kaj astragalo por sin fortigi, refreŝigi kaj senlacigi. Kaj tiuj homoj, kiuj ne havas sufiĉan sangon, povas trinki vinon kun maceritaj angeliko, ligustiko (*Ligusticum wallichii*), radiko de peonio (*Paeonia lactiflora*), preparita radiko de remanio (*Rehmannia glutinosa*), longana karno kaj jujuboj por pliigi sangon, kvietigi spiriton kaj forpeli agitiĝon.

La ĉina popolo konservas jenan moron: Ĉiujare en la Dubla-kvina Festo (la kvina de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro) super la pordo de ĉiu familio pendas kalamoj, la plenkreskuloj kaj infanoj trinkas realgaran vinon. Oni ŝmiras per la resta vino la frunton kaj orelojn de la infanoj kaj verŝas ĝin sur la plankon. Tia vino estas farita el realgaro kaj kalamo mikroko-ko-mortigaj kaj sentoksigaj, maceritaj en ĝi. Ĉiujare en varmaj tagoj oni uzas ĝin por preventi epidemion.

En malsamaj sezonoj oni faras aŭ aĉetas malsamajn vinojn por preventi malsanojn kaj protekti la sanon. Ekz., printempe oni trinkas *tusu*-vinon (ordinare en

Por komencantoj

Transloĝiĝo

MIA patro plantis du ĉinajn rozujojn en la korto. Ĉiutage mi kaj mia patro ilin akvumas. Kiel bele ili floras!


Estas bedaŭrinde, ke ni devas transloĝiĝi en novan domon. Ĝi havas brilajn fenestrojn kaj vastan balkonon. Estus pli bone, se ni metus sur ĝin kelkajn vazojn da floroj!

Antaŭ ol transloĝiĝi, miaj gepatroj estis okupitaj de ordigado de objektoj, kaj mi kolektis miajn fotoalbumojn, bildrakontojn, ludilojn ktp.

Subite mi ekpensis pri niaj rozuoj en la korto. Kiel amindaj estas iliaj floroj. Estus pli bone, se ni transplantus ilin en vazojn kaj metus ilin sur la balkonon de la nova domo.

Mi diris tion al la patro, tamen li diris al mi kun rideto: “Oni ne povas transplanti florumojn rozujojn, alie la floroj forvelkos.”

la Printempa Festo) por preventi infektajn malsanojn; somere mirik-fruktan vinon por preventi sunfrapon kaj kuraci lakson; aŭtune kratag-fruktan vinon por reakiri forton kaj preventi aterosklerozon; kaj vintre tonikan



Pripensinte, mi diris: “Do, ni lasu ilin al la nova mastro de la domo.”

Mia patro aprobe kapjesis: “Jiji, vi pravas. La floroj estas belaj, kaj via koro des pli bela.” Aŭdinte tion, mi eksentis dolĉecon en la koro.

En la tago, kiam ni transloĝiĝis, mi lastfoje akvumis miajn amindajn rozujojn, dirante: “Trinku, sate trinku, miaj floroj!”

Krome, mi petis mian patron skribi sur paperfolio “Bonvolu akvumi ilin ĉiutage”, kaj ĝin gluis sur muro de la korto.


Alvenis la kamiono por transporti la objektojn. Mia patrino forlasis nian malnovan domon, tirante min je la mano. Forirante, mi turnis la kapon kaj vidis, ke la rozoj floras pli ĉarme en la suno.

vinon por vigligi energion, pliigi sangon kaj preventi malvarmon.

La ĉinaj kuracaj vinoj estas valora heredaĵo de la ĉina farmacio kaj daŭre kontribuos al la homaro.

Bela pejzaĝo de Ĝiŭhŭa-monto

de SJŬEŜENG



Montpinto Avalokitesvaro

LA granda ĉina poeto Li Baj en la oka jarcento tre ŝatis la pejzaĝon de Ĝiŭzi-monto. Li trifoje vizitis la monton, ĝuan- te ĝian belecon. En lia poemo li komparis la monton kun “Ĝiŭ- hŭa” (lotusfloroj), tial ĝi ekĝuis la famon en la mondo per sia nova Ĝiŭhŭa. Post Li Baj ankaŭ multaj aliaj poetoj kaj verkistoj de diversaj dinastioj, tiklitaj de ĝia ĉarmo, vojaĝis tien. Laŭ ne- kompleta statistiko ili verkis pli ol 500 poemojn kaj eseojn pri- kantantajn la monton.

Ĝiŭhŭa-monto situas en la gu- bernio Ĉingjang de la provinco Anhuj ĉe la suda bordo de Jangzi-rivero. Ĝia origino estas sama kiel tiu de alia fama pito- reskejo, Hŭangŝan-monto de la provinco. Ĝi kovras spacon de cent kilometroj kaj havas 10 ri- veretojn kaj 99 montpintojn. Ĝia ĉefa montpinto Ŝi-ŭang altas 1 342 metrojn super la marni- velo.

Tie la trafiko estas oportuna. Ĉiutage regulaj busoj kursadas

inter Ĝiŭhŭa-monto kaj ĝiaj ĉir- kaŭaj 14 gubernioj kaj urboj. En la somerkomenco de la kuranta jaro, mi aŭte veturis malpli ol du horojn de Gujĉi kaj atingis Ĝiŭhŭaĝje, kiu troviĝas en base- no de la monto, 650 metrojn alta super la marnivelo, kun vendejoj kaj hoteloj, kie pasloĝas granda parto de turistoj.

Antaŭ pli ol mil jaroj Ĝiŭhŭa- monto estis kultejo de budhistoj kaj unu el la kvar budhismaj sanktejoj de Ĉinio. Antikvuloj skribis jenan verson: “Ĝiŭhŭa- monto abundas je mil temploj, kiuj dise lokiĝas en nuboj.” Laŭ tio oni povas scii, kiel prospera estis la budhisma afero tiutempe. Dum jarmilo Ĝiŭhŭa-monto plur- foje floris kaj dekadencis. Nun tie ankoraŭ troviĝas 78 temploj, kiuj plejparte koncentriĝas en Ĝiŭhŭaĝje.

De la hotelo Dongja, kie mi pasloĝis, kvin minutoj jam sufiĉas por piediri al la templo Hŭaĉeng. Ĝi estas la unua tem- plo de Ĝiŭhŭa-monto. Historiaj

materialoj notis, ke en 719 a. K. la 24-jara Kim Kiao Kak, proksi- ma parenco de la korea reĝo, ve- turis trans la maron kaj venis al Ĝiŭhŭa-monto por memkulturi. Dum longaj jaroj li loĝis en ka- verno apud rivereto. Tio profun- de kortuŝis iun sinjoron de la gubernio Ĉingjang. Li konstru- igis templon Hŭaĉeng por Kim Kiao Kak. Poste la kortego de Tang-dinastio donis al ĝi la hori- zontalan tabulon kun surskribitaj ideografiaĵoj “Hŭaĉeng-templo”. De tiam tie iom post iom multi- ĝis temploj kaj bonzoj.

La nuna Hŭaĉeng-templo estis rekonstruita. La templo konsis- tas el kvar vicoj da haloj, kiuj sin apogis sur la monto. Ili, sime- trie dislokiĝantaj kun delikata varieco, aspektas pompe. Ĝiaj lintelo, konzoloj, traboj kaj ko- lonoj ĉiuj estis kolore farbitaj. Sur la plafono de la ĉefa halo, viglas naŭ drakoj ludantaj per- lon. Estas menciinda la Sutro- konserva Domo. Arkitektoj kons- tatis, ke tiu plej antikva kons-

truaĵo el la nun ekzistantaj temploj de Ĝiŭhŭa-monto estis konstruita de Ming-dinastio inter la 15-a kaj 16-a jarcentoj. En 1857 la tri antaŭaj haloj de la templo forbrulis de incendio kaj restis nur la Sutrokonserva Domo. Oni diras, ke ĝiaj konstruaj materialoj, natura heleco kaj aerumado ĉiuj estis karakterizaj. Nun oni ŝanĝis la templon en Ĝiŭhŭa-an eksponejon de antikvaĵoj, inter kiuj troviĝas multe da raraĵoj, ekz., antaŭ-dumil-jara *pattra*, pli ol 7 700 volumoj da budhismaj sutroj, oraj kaj jadaj sigeliloj donacitaj de imperiestroj, 81 volumoj da sutroj skribitaj de iu eminenta bonzo dum 28 jaroj per ora pulvoro miksitaj kun lia sango, kaj unukorna besto — grandega artaĵo muldita el kupro antaŭ pli ol 500 jaroj, k.a.

Forlasinte Hŭaĉeng-templon kaj trapasinte Ĝiŭhŭaĝje, post 20-minuta piedirado sudokcidenten laŭ la deklivo oni atingas Ĵouŝen-templon. La halo, tegmentita per feraj tegoloj, majeste staras sur la montosupro, al kiu kondukas 81 ŝtupoj. Post la morto de Kim Kiao Kak je la aĝo de 99 jaroj, oni rimarkis, ke lia aspekto estis simila al *Ksitigarbha* notita en budhisma sutro, kaj konfirmis ke li ja estis enkarniĝinta *Ksitigarbha*, tial oni honoris lin per la nomo *Kimksitigarbha* kaj konstruis halon sur la monto, kie oni entombigis lin. Tieaj bonzoj konigis, ke ĉiujare en la Festo *Ksitigarbha* enkaj eksterlandaj pilgrimantoj venas incensi al li de mateno ĝis vespero.

Sed por mi la plej alloga estis la natura pejzaĝo de la monto. Frumatene de la sekvanta tago, mi decidis grimpi sur Tjantajmontpinton.

Tjantaj situas sudoriente de Ĝiŭhŭaĝje je ok kilometroj najbare al la ĉefa montpinto. Kvan kam la vojo estas kruta, tamen la ŝtuparo, kiu rekte kondukas al ĝi, multe faciligis grimpadon. Oni nombris antaŭ Ĝiŭhŭa-monto 240 001 ŝtupojn, instalitajn en la pasintaj centoj da jaroj. Kiam mi grimpadis laŭ la ŝtuparo, pretervole naskiĝis al mi admiro kaj danko al tiuj prauloj, kiuj elhakis la vojon por ni posteuloj.

Por atingi Tjantajmontpinton oni devas unue grimpi trans la monteton Dongja. Kiam mi rigardis orienten de sur la monteto, mi vidis, ke la montpintoj ĉirkaŭe skrapantaj la ĉielon respektoplene defendas kiel vico da seriozaj sentineloj la misteran arbaron vualitan de nuboj kaj nebulo. En la valo la rivereto Longĝjan torentas norden kun bruego. Ĝi estas la plej granda el la dek riveretoj de Ĝiŭhŭa-monto. Antaŭ kelkaj jaroj la lokanoj konstruis tri malgrandajn hidroelektrajn, tiel ke solviĝis la tiea prilumado. Ĉirkaŭ Longĝjan ĉie kreskas abundaj bambuaroj, kiuj kovras minimume 150 hektarojn. La tieaj vidindaĵoj estas tute naturaj. Neniu el ili artefarita. Eĉ la templetoj semitaj sur la monto portas stilon de popola arkitekturo. La domoj ĉiuj estas el grizaj tegoloj kaj blankaj muroj, estas modestaj, harmoniaj kun la ĉirkaŭaj verdaj montoj kaj akvoj.

Forlasinte Dongja, transirinte Longĝjan kaj elirinte el bambuaro, mi vidis, ke malproksime salutas antikva pino. Tiam forvoriĝis la nuboj kaj la antikva pino aspektas pli ĉarme en la brila suno. Ĝi kviete staris tie jam pli ol mil jarojn. Ĝiaj dika

trunko kaj densa krono aspektas kiel fenikso etendanta la flugilojn, tial oni nomis ĝin “Pino Fenikso”. La turistoj preskaŭ senescepte volas sin foti kune kun ĝi.

Pli supre de la Pino Fenikso la vojo fariĝis pli kaj pli kruta, unuflanke de la vojo estas profunda abismo, aliflanke estas alta klifo. Mi anhelis tuta en ŝvito, dum iuj aliaj jam atingis la kulminon kaj komencis malsuprengrimpi. Ili preterirante, ĉiam instigis nin: “Hej! Vi tuj atingos la celon.”

Mi ne sciis, kiam nuboj kaj nebulo refoje vualis la montojn. Kiam mi estis baldaŭ atingonta Avalokitesvaran templon, la fama montpinto Avalokitesvaro malsupre en la profunda valo, kiu distancas de mi malpli ol dek metrojn, kaŝiĝis en nebulo, ŝajnis al mi, ke tiu konusa roko en nebulo fariĝis malklare konturita, pli similas al la svelta bodisatvo Avalokitesvaro. En la monto Ĝiŭhŭa troviĝas multe da strangformaj montpintoj kaj gigantaj rokoj, kiujn la turistoj povas laŭplaĉe pririgardi laŭ sia imago.


Finfine mi trairis kavernon, sur kiu estas gravuritaj ideografiaĵoj signifantaj “ne la homan mondon”, kaj surgrimpis la kulminon de la montpinto Tjantaj 1 320 metrojn super la marnivelo. Tie nuboj flosetis kaj ventoj muĝis. Starante sur la supro de Tjantaj-monto mi sentis, ke mi kvazaŭ troviĝus en fea lando. Tamen ni ĉiuj, kiuj kune grimpadis kaj atingis la kulminon, preferis la homan mondon. Ni ĝoje babilis, ĝuante la plezuron de la venko super la danĝeraj kaj altaj montoj.



La templo Ĵouŝen sur la monto

ĜIŬHŬA-MONTO

Fotoj de CAJ HAJFENG



La montpinto Tjanĝu en malproksimo



La pitoreska templo
Ĝijŭan konstruita en
la 16-a jarcento



La monto en matenkrepusko

La pino Fenikso



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



Pagoda Pavilono en Rastatt, konstruita kiel baroka tesalono



Baroka preĝejo S. Aleksandro en la centro de Rastatt

de **HORST FISCHER**
(FR Germanio)



Memkuracado de hipotensio

de ĜJA JING

TROLACIĜO, misfunkciado de kortiko, miokardia infarkto, stomaka kaj duodena ulceroj, akuta kora insuficienco kaj malfortiĝo de peri-cirkulado estas ofte akompanataj de hipotensio. Se vi suferas hipotension, vi sentas lacon, mankon de energio kaj malkomforton ĉe la brusto antaŭ la koro. Precipe kiam vi ellitiĝas aŭ klinas la kapon, vi sentas kapturton. Memmasaĝo kaj korpa ekzercado helpas akceladon de funkcio de via kardiovaskula sistemo, reguligon de ekscitiĝo kaj inhibicio de via cerba kortiko kaj renormaligon de via tensio.

MEMMASAĜO

Kuŝu surdorse kun la brakoj etenditaj ambaŭflanke de la korpo, kun okuloj fermitaj kaj korpo malstreĉita, sen pensado, faru en- kaj elspiron du-kvin minutojn kaj post tio masaĝu sin mem. Faru jenajn masaĝojn:

1. Iom fleksu kaj disigu la fingrojn, metu ilin sur la verton kaj masaĝu ĝin du-tri minutojn (vd. bildon 1).

2. Iom levu la mentonon, metu la maldekstran manplaton sur la dekstran flankon de la kolo kaj masaĝu ĝin 8-10 fojojn de la mentonrando ĝis la klaviklo. Masaĝu same la maldekstran flankon de la kolo per la dekstra mano.

3. Milde premu per dikfingro 5-6 sekundojn la arterion ĉe mentonrando (vd. bildon 2) kaj ripozu 10-15 sekundojn. Ripetu tion 3-4 fojojn. Poste faru la samon ĉe la alia flanko.

4. Metu la fingrojn sur la frunton kaj faru masaĝon ĝis la tempioj kaj knedu ilin per la manradikoj. Ripetu tion 8-10 fojojn (vd. bildon 3).

5. Premu la tempiojn per la mezfingroj 5-6 sekundojn, pli kaj pli forte (vd. bildon 4). Ripetu tion 5-6 fojojn.

6. Kuŝu surdorse, metu la manplatojn sur la malsupran parton de la brusto, profunde enspiru, premu la bruston kaj profunde elspiru. Ripetu tion 2-3 fojojn.

Faru jenajn korpajn ekzercojn sur lito:

1. Kuŝu surdorse kun la brakoj levitaj supren kaj la fingroj interkroĉigantaj, forte tiru la fingrojn enspirante kaj faru elspiron por repreni la komencan teniĝon. Ripetu tion 3-4 fojojn.

2. Kuŝu surdorse, metu la brakojn ambaŭflanke de la korpo, enspiru, fleksu la genuojn kaj kunmetu ilin, kaj poste kuntiru la gambojn, ke ili laŭeble tuŝu la bruston; reprenu la komencan teniĝon elspirante. Ripetu tion 5-6 fojojn.


3. Kuŝu surdorse, enspiru, klinu la kolon antaŭen, ke la mentono tuŝu la bruston, kaj poste elspiru. Ripetu tion 5-6 fojojn.

4. Sidu sur lito, turnu la kapon maldekstren kaj poste dekstren. Ripetu tion 5-6 fojojn.

5. Sidu sur lito, turnu la supran parton de la korpo dekstren kaj maldekstren. Ripetu tion 4-5 fojojn.

6. Sidu sur lito, klinu antaŭen la supran parton de la korpo kaj etendu la brakojn horizontale antaŭen, ke la manoj laŭeble tuŝu la piedojn. Ripetu tion 5-6 fojojn.

7. Kuŝu surdorse, rektigu kaj kunmetu la gambojn, levu ilin ĝis 50-60 gradoj enspirante kaj mallevu ilin elspirante. Ripetu tion 6-8 fojojn.





Tuğja-a knabino

Gasti en Tuğja-a vilaĝo

de LU JONGĜING

ANTAŬ nelonge mi veturis laŭ rivereto en la sudorienta parto de Siĉŭan-provinco. Tie mi vizitis la belan Joŭĵangan tuğja-an kaj mjaŭ-an aŭtonoman gubernion kaj gastis en tuğja-a vilaĝo.

Tie sur iuj montoj kreskas altaj antikvaj arboj, sur aliaj ĉarmas sovaĝaj floroj inter verdaj folioj aŭ prosperas smeraldaj bambuoj. Mi iris sur zigzaga ŝtonplata pado en bambuaro. Malaperis la vojeto, mi heziteme rigardis ĉirkaŭen, ĝuste tiam mi vidis domon en la densa bambuaro. Mi do rapidis tien. Antaŭ la domo mi vidis tuğja-an maljunulon, kiu en silka kaptuko kaj blua vesto el manteksita tolo fumis per unu-metra pipo, sidante sur la sojlo. Mi petis de li akvon. Rimarkinte, ke mi estas gasto de malproksime, li tuj stariĝis kaj invitis min endomiĝi kaj ripozi sur la briklito.

Lia nepino alportis faskon da sekaj brulaĵoj. Li bruligis fajron, metis kaldronon sur la fornon kaj, kiam la kaldrono estis

varmigita, verŝis en ĝin duonkuleron da teoleo. La ĉambron tuj saturis teolea bonodoro. La maljunulo diris al mi, ke teoleo estas refreŝiga kaj sensoifiga por piedirantoj.

Kiam la oleo boliĝis, li ĵetis pinĉaĵon da tefolioj en la kaldronon kaj, fritinte momenton, enverŝis akvon, aldonis zingibron, kapsikon kaj fumaĵitan viandon. Post momento la akvo boliĝis, la maljunulo do verŝis bolaĵon en bovlon kun frititaj sojfaboj kaj sekigitaj toŭfuopecetoj (toŭfuo = fabkazeo) kaj ambaŭmane proponis ĝin al mi. Ankaŭ li havis bovlon da trinkaĵo. Ni do ektrinkis dum babilado. Li diris al mi, ke la tuğja-oj ŝatas teolean trinkaĵon, ĉar ĝi estas varmiga en vintro kaj povas sendanĝerigi sunfrapon en somero kaj estingi soifon, senlacigi kaj malebriigi. Ofta trinkado de ĝi estas tre utila al la sano.

Trinkinte, la maljunulo akompanis min elvilaĝiĝi. Survoje mi vidis kelke da domoj super la tero kaj subtenataj de kolonoj.

Mi petis la maljunulon rakonti al mi pri la loĝkondiĉoj de la tuğja-oj. Li diris al mi, ke la tuğja-oj ŝatas loĝi ĉe montpiedo apud rivero, kaj ĝenerale tuğja-oj kun sama familia nomo loĝas en sama vilaĝo. Iliaj domoj plejparte frontas al la sudo kaj havas malsaman strukturon. En la pasinteco nur la riĉaj familioj loĝis en domoj surfostaj. Nun multaj familioj riĉiĝis, pli kaj pli multaj familioj loĝas en tiaj domoj, elegantaj eĉ kun kolore pentritaj kolonoj kaj balustradoj.

En vigla babilado ni elvilaĝiĝis sen rimarko de la irita vojo. Mi adiaŭis la maljunulon. Irinte kelkajn kilometrojn en la montaro mi renkontis ĉe puto knabinon lavantan legomojn. Mi demandis ŝin, ĉu ĉirkaŭe troviĝas gastejo. Kun rideto, ŝi prenis la lavitajn legomojn kaj kondukis min al sia hejmo. Ĝi estas kvin-membra familio. Tri el ili eldomiĝis por labori kaj hejme restis nur la knabino kaj ŝia avino. Ŝia avino estis pli-ol-



Ili manĝas farĉitan toŭŝuon.


70-jara, klar-aŭda kaj klar-vida kaj ankaŭ mense klara en parolado. Ŝi insiste petis min vespermanĝi kune kun ili kaj tranokti en ilia domo. Mi sciis, ke la tuĝja-oj estas gastamaj, do konsentis.

Super la lito en la domo pendis pluraj pecoj da fumaĵita viando. Preparante manĝaĵojn, la maljunulino diris al mi, ke ĉi-jare ŝia familio buĉis kvar porkojn en la Printempa Festo. Post nelonge prepariĝis la vespermanĝo, tiam ŝiaj edzo, filo kaj bofilino hejmen revenis de kamplaboro. La maljunulino metis sur du benkojn meze de la apudforna lito la preparitajn tohuon, fumaĵitan viandon kaj batatan supon. Ni ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭ la benkojn kaj komencis nian vespermanĝon en gaja babilado.

Matene de la sekvinta tago mi adiaŭis la gastamajn mastrojn kaj daŭrigis mian vojaĝon laŭ vojstreko. Mi vidis junan paron iranta renkonte al mi. La junulo vektoportis du korbojn plenajn de gluec-rizaj buloj kaj la junulino dorse portis porkfemuraĵon kaj kelkajn pecojn da fumaĵita

viando. De iu lokano mi informiĝis ke ili estis paro da novgeedzoj irantaj viziti la gepatrojn de la novedzino. Laŭ la tuĝja-a moro la novedzino devas viziti, kune kun sia edzo, siajn gepatrojn en la tria tago post sia edziniĝa ceremonio. Li diris al mi, ke la geedziĝo de tuĝja-oj estas tre kompleksa. Unue la junulo devas peti la manon de la knabino, konatiĝi kun ŝia familio, poste viziti ĝin en la Printempa Festo, interŝanĝi kun ŝi karton kun surskribita naskiĝdato kaj donacojn kaj fine edziĝi. Ankaŭ la knabino devas fari multe. Ŝi devas plori pri sia forlaso tri noktojn sinsekve antaŭ la nupto, devas plorakompani ŝin ankaŭ ŝiaj onkloj, fratinoj kaj kuzinoj. Oni devas fortordi al ŝi la vizaĝlanugon kaj fari ŝiajn brovojn lunarkaj per grizaj fadenoj. Anstataŭ la harligoj, oni devas plekti al ŝi hartuberon kun arĝenta pinglo kaj ruĝa silka ŝnureto ĉe la mezo. En la nupta tago ŝi devas porti nigran silkan kaptukon, arĝentajn braceletojn, fingroringon kaj orelingojn. Frumatene bele ornamitan nuptan palankenon la

novedzo jam venigis al la familio de la novedzino. Li devas fari publikan promeson, ke li vivos kun sia edzino harmonie dum la tuta vivo. La novedzino, en ruĝaj vestoj, estas dorse portata de sia frato al la meza ĉambro, tie plore riverencas al siaj prapatroj, poste sidiĝas en la palankenon kaj la hejmon forlasas en muziko de surnaoj, tamburo kaj gongo. En la hejmo de la novedzo, post la nuptosoleno, la novgeedzoj, sekvate de amaso da gratulantoj, eniras en la novgeedzan ĉambron kaj, sidante ĉe la litorando, trinkas po unu glason da vino pro la nova feliĉa vivo. La nupto de la tuĝja-oj estas tre spektinda. Bedaŭrinde mi ne havis la bonŝancon. Oni diris al mi, ke nuptosoleno de tuĝja-oj ofte okazas dum la Printempa Festo. Mi esperas, ke mi havos ŝancon gastari refoje en tuĝja-a vilaĝo kaj vidi tian spektindaĵon.



Ĉarma Dancdramo de Mjaŭ-nacieco

NIA gazeto en n-ro 4 de 1982 aperigis la polrakonton "Meĉo-floro" de mjaŭ-nacieco. En la unua tagdeko de aprilo ĉi-jare, en la Kultura Palaco de Naciminoritatoj de Pekino, la Nacia Kantodanca Trupo de la Liŭĝoŭ-a Regiono de Gŭangŝji prezentis la grandan ses-scenan dancdramon, kiu estas adaptaĵo de la rakonto "Meĉo-floro". Mi spektis ĝin kun granda intereso.

La dancdramo komenciĝis en varma aplaudado kaj finiĝis en pli varma aklamado. Kiam la rigardantoj unu post alia foriris, mi ankoraŭ longtempe restis en la halo.

Tiu dancdramo ja estis poemo prikantanta la diligentecon: La feino Meĉo-floro ŝvebe venas en la homan mondon, transformas sian arĝentan harpinglon en arĝentan ŝpaton kaj donacas ĝin al la mjaŭ-a knabo Dulin, kaj samtempe ŝi memvole edziniĝis al li. Ili diligente laboras, hakas ŝtonojn, luktas kontraŭ Ŝtondemono kaj kune vivas feliĉan vivon. Sed post riĉiĝo Dulin ne volas plu diligente labori kaj komencas sin distri tuttage. Profitante tian okazon Ŝtondemono forlogas lin kaj volas akiri lian arĝentan ŝpaton kontraŭ fea birdo. Meĉo-floro deadmonas lin vane kaj mistere kaŝiĝas en la bambuan lanternon. Post kiam la feino estas foririnta kaj la arĝenta ŝpato perdita, Dulin tre bedaŭras, tiel ke li devas denove haki ŝtonojn sur la monto. Kiam Ŝtondemono sin ĵetas al li, Meĉo-floro helpas lin per magia lumo el la bambua lanterno. Ŝtondemono estas morti-

gita kaj revenas la feino Meĉo-floro. Ili denove diligente laboras kaj vivas feliĉan vivon.

La dancdramo prezentas serion da bildoj pri la mjaŭ-naciecaj moroj. La gaja kaj interesa vindanco montras la moron, ke la mjaŭ-nacieca knabino, pinĉante la knabon je orelo, trinkigas lin per vino ĉe la nupto. La facila kaj vigla danco Piedpremi Franjon spegulas apartan metodon, ke la mjaŭ-nacieca knabo intence piedpremas la knabinon por montri al ŝi sian amon. La sentoplenu Luŝengdanco (luŝengo, bambua blovinstrumento, ludata de ĉinaj naciminoritatoj) priskribas interŝanĝon de la amsento inter la mjaŭ-naciecaj geknaboj. La malalt-tona kaj korporema feokulta danco tamen estas vera imitaĵo de la feokulta rito de mjaŭ-oj. . . Krome ĝia muziko fundamente alprenas popolkantojn kaj ties melodion de la nacieco, kio sentigas fortajn kaj ravajn mjaŭ-ajn trajtojn.

Ĉu la dancdramo estas songo aŭ realo? Ĉu ĝi okazas en paradizo aŭ en la hommondo? Ĉio tio estas malfacile distingebla pro ĝia mirindeco.

Meĉo-floro estas feino, kiu povas ŝvebe veni kaj malaperi nerimarkite, transformi la arĝentan harpinglon en magian ŝpaton kaj helpi Dulin venki Ŝtondemonon. Meĉo-floro estas ankaŭ homo, ŝiaj ĝojo kaj malĝojo montras la implicajn kaj riĉajn sentojn, proprajn al la mjaŭ-naciecaj knabinoj. Ŝi amas arde, malĝojas korŝire, malamas ĝisoste. . . Kiel sentimentala ŝi estas!


La komplikaj intrigoj, humorakra feino kaj lirikismaj ĝenroj, ĉio ĉi ebriigis min tiel, ke mi eĉ ne kredis ke ĉio ĉi estas kreita kaj prezentita de loka naciminoritata kantodanca trupo.

En la sekva tago mi vizitis Long Laŭtaj, la koregrafon kaj reĝisoron de la dancdramo. Li estas pura mjaŭ-o kun peza dialekta tono. Liaj grizaj tempiharoj, profundaj sulkoj kaj puraj vestoj montris la memfidecon, obstinecon kaj serenecon proprajn al la mjaŭ-oj. Ni babilis pli ol 3 horojn kvazaŭ malnovaj amikoj.

En 1954, kiam la 28-jara Long Laŭtaj estis ankoraŭ analfabeto, li kun sia amata luŝengovenis lerni dancon en la Pekina Danclernejjo. Post du jaroj li estis sendita al la Centra Nacia Kantodanca Ensemblo kaj tie li servis kiel instruisto kaj aktoro. Li devus esti kontenta antaŭ sia brila kaj promesplena vojo.

Sed tiam Long Laŭtaj estis turmentita de iu perplekseco: La mjaŭ-a nacieco devas havi sian

Reĝisoro Long Laŭtaj (la plej maldekstra), ĉefroluloj kaj arta konsilanto de la dancdramo "Meĉo-floro"



propran dancdramon! Tiu penso akompanis lin de kelkaj jaroj. Finfine, kiam li decidiĝis forlasi Pekinon kaj revenis al sia hejmloko Gŭangŝji, li jam fariĝis mezaĝulo. Adiaŭante Pekinon li interkonsentis kun siaj malnovaj kolegoj: Li certe koregrafos dancdramon de mjaŭ-oj kaj prezentos ĝin en Pekino.

Li elektis por si malfacilan vojon.

Unue, estas necese kulturi dancistojn de la naciminoritatoj mem. Lia hejmloko Liŭĝoŭ estas regiono loĝata de multaj naciecoj. Li do funkciigis literatur-artan kurson por baki talentulojn. En 1975 en sia kurso li trovis, ke la 18-jara Mo Ŭenlin, kiu neniam estis trejnita en dancado, havas firman obstinecon kaj temperamenton proprajn al la naciminoritatoj. Long Laŭtaj opiniis, ke sole dank' al tio li fariĝos elstara aktoro de naciaj dancoj.

La fakto pruvis, ke Long Laŭtaj estas akrevida. Kiam Mo Ŭenlin eliris sur la scenejon de Pekino, lia dancarto akirita per lia firma obstineco, liaj simpleco, honesteco kaj sereneco eltenis la rigoran ekzamenon de la superaj ĉinaj fakuloj.

Ankaŭ Jang Ŝiping, kiu ludis la ĉefrolon de Meĉo-floro, estas elkulturita de Long Laŭtaj. Jang Ŝiping en sia 15-jara aĝo venis lerni dancadon en la kantodanca ensemblo. Inluate de siaj kante-maj gepatroj, ŝi havas profundan amon al la kulturo de sia nacieco, kaj plie si estas venkoavida. Kun tiaj eminentaj trajtoj, zorge kulturata de Long Laŭtaj kaj aliaj ŝi rapide fariĝis elstara dancistino.

Tagon post tago kreskis la kantodanca ensemblo: Junaj aktoroj el la naciecoj mjaŭ-a, dung-a, jaŭ-a, ĝŭang-a kaj molaŭ-a senĉese levis

sian prezentan nivelon, tiel ke maturiĝis la kondiĉoj por prezenti la grandan dancdramon.

En la komenco de 1981, "Gŭangŝji-a Tag-jurnalo" publikigis "Meĉo-floro", mjaŭ-naciecan popolrakonton cirkulantan en la Damjaŭ-a Montaro de la Liŭĝoŭ-a Regiono. Long Laŭtaj estis ravita de tiu verko. De tiam, Long kaj kelkaj aliaj kolegoj absorbiĝis en verkado de la dancdramo Meĉo-floro.

Verki dancdramon estis malfacile. Por sperti la vivon en Damjaŭ-a Montaro loĝata de mjaŭ-oj, kutime oni devas piediri la tutan tagon. Iufoje, la tieaj mjaŭ-oj rifuzis liveri koncernajn materialojn eĉ al Long Laŭtaj pro tio, ke en la dramo oni priskribis la figuron de mjaŭ-a mallaboremulo. Iufoje, Long Laŭtaj sole kolektis materialojn pri la malbonfaro de Ŝtondemono en la Damjaŭ-a Montaro por la dancdramo. Kiam li vizitis iun mjaŭ-an maljunulon, bone sciantan la oferritojn de mjaŭ-nacieco, tiu tamen sidis senparole. Post plurtaga kunloĝado la maljunulo estis konvinkita, ke la vizitanto estas konfidinda. Sekve, li prezentis acidigitan fiŝon, konservitan pli ol 20 jarojn, por lin regali kaj gestante rakontis al li multajn interesajn rakontojn pri oferado, el tio multe lernis Long Laŭtaj. Multaj figuraj danc-movoj de lia rakonto estis prilaboritaj kaj uzitaj en priskribo de Ŝtondemono en la dancdramo.

Dank' al granda penado li finis la unuan manuskripton de la dancdramo en julio de 1981. Post prezentado la dramo vekis grandan atenton de la Kultura Ministerio, la Ŝtata Komisiono pri la Naciminoritataj Aferoj kaj aliaj gvidaj instancoj. Ili plurfoje sendis rigardi prezentadon en Gŭangŝji kaj aparte akcentis, ke la dancdramo devas teni la naciajn stilojn. Ankaŭ la Dancarta Insti-

第九课

Naŭa Leciono

Kie Vi Loĝas?

I. vortoj

han-lingvo	han-lingva fonetika alfabeto	Esperanto
家 (subst.)	jiā	hejmo
如果 (subjunkcio) ¹	rúguǒ	se
有 (verbo)	yǒu	havi
时间 (subst.)	shíjiān	tempo
一定 (adverbo) ²	yīdìng	certe
去 (verbo) ³	qù	iri
住 (verbo)	zhù	loĝi
告诉 (verbo)	gàosu	diri, sciigi
百万庄路 (propra nomo)	Bǎiwànzhūānglù	Bajŭanĝŭānglu (stratnomo)
号 (subst.)	hào	numero
怎么 (demanda pronomo)	zěnmē	kiel
乘 (verbo)	chéng	veturi

tuto sub la Ĉina Arta Akademio sendis fakulojn por helpi la provludon de la dancdramo.

Multe kuraĝigite kaj edifite, Long Laŭtaj kaj liaj kolegoj ree enprofundiĝis en la vivon kaj okfoje reviziis la manuskriptojn. Kiel aranĝi la kontraŭdiron inter Meĉo-floro kaj Dulin? Kiel esprimi la amon de Meĉo-floro al Dulin kaj ŝian plendadon kontraŭ li? Pri ĉio ĉi ili ofte arde diskutis, foje refoje pripensis ĉiun dancmovon kaj ĉiun muzikecon de la dancdramo, por pli bone speguli la humoron kaj sentojn de la mjaŭ-oj.

La malfacila kreado hardis Long Laŭtaj kaj aliajn kaj faris ilin kompare kompetentaj koregrafoj, reĝisoroj kaj komponistoj. Aparte menciinde estas, ke ili ekhavis siajn apartajn opiniojn pri la dancarto de sia nacieco.

Long Laŭtaj diris al mi, ke li volis pluapase reformi la dancdramon por ke ĝi fariĝu des pli facilmovna, lerta, delikata kaj gracia kun la naciaj trajtoj. “La mjaŭ-naciecaj virinoj havas siajn apartajn trajtojn,” Long Laŭtaj fiere diris, “ilia sentoesprima maniero estas implica. Per iomete turnita korpo, delikata fingro-mordo kaj aliaj substilaj movoj ili esprimas sian korŝiran doloron. Tial, oni neniel devas blinde imiti la larĝajn movojn de baletoj el la okcidentaj landoj.”

Ĉe adiaŭo, manpremante min Long Laŭtaj diris: “Ni akiros fortan vivipovon nur tiam, kiam ni enradikiĝos en nia propra nacieco.”

Lia dika kaj forta mano sentigis al mi la forton de liaj vortoj.

路 (subst.)	lù	linio (por indiki vojlinion de buso)
公共汽车 (subst.)	gōnggòngqìchē	buso

2. teksto

han-lingvo	林红: “安娜, (我) 欢迎你来我家。”
HFA	Lín Hóng: “Ānnà, (wǒ) huānyíng nǐ lái wǒ jiā.”
aŭvorta traduko	(mi) bonvenig- vi ven- mi (a) hejmo
Esp-a traduko	Lin Hong: “Anna, mi bonvenigos vin al mia hejmo.”
han-lingvo	安娜: “谢谢。如果有时间我一定去。你住在哪里?”
HFA	Ānnà: “Xièxie. Rúguǒ yǒu shíjiān wǒ yīdìng qù. Nǐ zhù zài nǎli?”
laŭvorta traduko	dank- se hav- tempo mi certe ir- vi loĝ- kie
Esp-a traduko	Anna: “Dankon. Se mi havos tempon, mi certe iros. Kie vi loĝas?”
han-lingvo	林红: “我住在百万庄路二十四号。”
HFA	Lín Hóng: “Wǒ zhù zài Bǎiwànzhuānglù èrshí sì hào.”
laŭvorta traduko	mi loĝ- en Bajŭangŭanglu dudek kvar numero.
Esp-a traduko	Lin Hong: “Mi loĝas en la domo n-ro dudek kvar, Bajŭangŭanglu.”
han-lingvo	安娜: “请告诉我(我)怎么去你(的)家。”
HFA	Ānnà: “Qǐng gàosu wǒ (wǒ) zěnmē qù nǐ (de) jiā.”
laŭvorta traduko	bonvol- dir- mi (mi) kiel ir- via hejmo
Esp-a traduko	Anna: “Bonvolu diri al mi kiel mi povas atingi vian hejmon.”
han-lingvo	林红: “乘十五路公共汽车, 百万庄路下车。”
HFA	Lín Hóng: “Chéng shíwǔ-lù gōnggòngqìchē, Bǎiwànzhuānglù xià chē.”
laŭvorta traduko	vetur- dekkvin-linio buso Bajŭangŭanglu elbusiĝ-
Esp-a traduko	Lin Hong: “Veturu per buso de la dekkvina linio kaj elbusiĝu ĉe (la haltejo apud) Bajŭangŭanglu.”
han-lingvo	安娜: “好。谢谢。”
HFA	Ānnà: “Hǎo. Xièxie.”
laŭvorta traduko	bon- dank-
Esp-a traduko	Anna: “Bone. Dankon!”

Klarigoj

1. “如果……一定……” Per ĝi oni faras kompleksan frazon. “如果” kondukas subproponcion por indiki supozon kaj post “一定” estas ĉefproponcio montranta la sekvon. Ofte videblas jena tipo: “如果 A, 一定 B”。La subjunkcio “如果” povas esti lokita antaŭ kaj ankaŭ post la subjekto.
2. “一定” : Ĝi povas aperi antaŭ verbo aŭ adjektivo. Se ĝi estas uzata en la unua persono, ĝi esprimas firman volon de la parolanto. Uzate en la dua aŭ la tria persono, ĝi montras fortecon de la postulo aŭ certecon de la antaŭvido al iu afero.
3. “去” : verbo kun pluraj sencoj kaj multaj funkcioj. En tiu ĉi leciono ĝi signifas ke iu moviĝas direkte al alia loko.

En Universitato por Maljunuloj

(Bv. legi la artikolon "Ili strebas al rejuniĝo"
en tiu ĉi numero.)


Fotoj de CAJ HAJFENG



Ili ricevis legitimacion de lernanto.


Aprezado de pentrado





Fotoamantoj

Profesoro Ju Heng de la Agronomia Instituto de Ŝandong donas hortikulturajn lekciojn al studentoj de la Universitato por Maljunuloj.





Post sia emeritiĝo Niŭ Ŝinnong kaj lia edzino Ju Hongĝjŭan lernas kalfigrafion en la universitato. Jen ili sin klinas super belskribado hejme.



Ŝtudentoj de la sanproekta fako faras gimnastikajn ekzercojn en nateno.



Studentoj de la hortikultura fako esploras kreskadon de floroj.

Studentoj de la belarta fako en leciono



ILI STREBAS AL REJUNIĜO

*En la liberigita regiono, ho,
he!*

*viglas granda produktmo-
vado, ho, he!*

*L' armeanoj kaj la popola-
noj, si li li li ca la la la,
so lo lo lo taj,*

*ekbolas post mobilizado,
ho, he!*

Logate de la varma kaj gaja kantado, mi venis en la halon, ĉirkaŭitan de verdaj arboj kaj freŝaj floroj. Tie du junuloj — unu ludis harmonikon kaj la alia batis la takton, — gvidis lernantojn en ilia kantado pri memsavo per produktado fare de armeanoj kaj popoloj de la liberigita regiono en la kvardekaj jaroj. La griz-haraj lernantoj pliparte jam superis sesdek jarojn, tamen ili kantis ankoraŭ sufiĉe vigle. Kelkaj el ili venis kun siaj nepoj kaj nepinoj. Iuj infanoj ĉe la genuoj de siaj avinoj scivoleme rigardis tien kaj ĉi tien, aliaj ludis aliloke kun siaj kunuloj. Kiel viveca kaj interesa sceno.

Tio estis la unua impresoj, kiun faris sur mi la Maljunula Universitato de Ŝandong-provinco.

“Nia universitato estas fondita de la Ruĝa Kruco de Ŝandong-provinco, kiu ricevis la komision kaj finanĉan helpon de la registaro. Ĝi estas amasa organizaĵo de socia edukado por maljunuloj.” Tiel konigis al mi

Li Heng, vicestro de la provinca Ruĝa Kruco kaj konstanta vicrektoro de la Maljunula Universitato.

La afabla kaj energiplena Li Heng aĝas 76 jarojn. Li estis vicestro de la Higiena Departemento de Ŝandong-provinco. Li emeritiĝis en 1982. Edifite de fremdlandaj maljunulaj universitatoj, li kune kun siaj kolegoj fervoraj al la maljunula edukado fondis tiun Maljunulan Universitaton, la unuan en Ĉinio, en Ĝĵinan, la ĉefurbo de la provinco.

La maljuna vicrektoro daŭrigis: “Granda nombro da kadroj emeritiĝis en la lastaj jaroj. Estas ja granda problemoj kiel

akomodi ilin al la nova vivo kaj kiel pasigi bone la maljunecon. La ĉefa celo de nia universitata laboro estas riĉigi la vivon de maljunuloj, por ke ili estu ĝojaj, sanaj kaj longvivaj kaj prokrastigu sian maljuniĝon. Ni ne postulas de ili, kian edukitecon ili atingi.”

La universitata statuto difinis: Povas sin anonci al ĝi tiuj laboristoj kaj oficistoj emeritaj aŭ ofic-tenantaj, kiuj ne havas gravan malsanon kaj povas persisti en la lernado. La minimumaj aĝoj estas 60 jaroj por la viroj kaj 55 por la virinoj. La lernotempo estas du jaroj. La universitato fondiĝis septembre de 1983. Pro manko de iuj kondi-

Ding Ji (la dekstra) en muzika leciono



ĉoj, komence oni akceptis nur 980 personojn.

Dum unu jaro, por ĝojigi la vivon de la maljunuloj kaj kontentigi ilian avidecon al scioj, krom la deviga fako pri sanprotekto, la universitato funkciigis dek unu nedevigajn fakojn pri fizikkulturo de maljunuloj, nutrologio, belarto, kaligrafio, hortikulturo, muziko, fotografio, literaturo, historio, geografio kaj moderna scienco. La universitato invitis 57 kumulajn instruistojn, el kiuj la pliparto estas prestiĝaj vicprofesoroj kaj profesoroj. La universitato donas duhoran lecionon unufoje ĉiusemajne, kaj en la aliaj lernohoroj, la ĉefa formo estas memlerni kaj la helpantoj-direktantoj regule faras gvidadon en diversaj instruoregionoj. En la urbo starigis naŭ instruoregionoj laŭ la loĝ-distancoj de la lernantoj.

Pli interesa estas tio, ke la universitato funkciigas ankaŭ kursojn de "infana psikologio" kaj "infana sanprotekto", laŭ la propono de la vicrektoro. La maljuna vicrektoro klarigis humore: "Tio eble estas ĉina karakterizaĵo de nia universitato! Ke kelkaj generacioj loĝas en unu loĝejo, tio estas nia nacia tradicio. Se eĉ la maljunaj kaj junaj generacioj ne loĝas kune, ili tamen tenas kompaktan kontaktigon. Mi kaj mia edzino ja vivas kune kun niaj filo kaj nepo. En la libera tempo, mi ofte iras al mia filino por viziti la nepon kaj dimanĉe ili ĉiuj venas, kolektiĝas ĉe mi. Ni, maljunuloj, ja amas infanojn. Posedi la sciojn pri infana psikologio kaj infana sanprotekto utilas al la sana kreskado de la tria generacio. Krome, la harmonia kunvivado estas senlima ĝojo por ni."

Post la fondiĝo de la universitato, iuj timis, ke ĝi eble malorganiziĝos post peco da tempo. Sed mia travivaĵo dum kelkaj tagoj jam bone pruvis, ke tiu timo estas superflua.

La 67-jara Ding Ji estas veterana oficisto, kiu partoprenis la revolucion de la tridekaj jaroj kaj multfoje vundiĝis. Tamen ŝi aktive strebas al sia rejuniĝo. Sin apogante sur la man-bastono, ŝi persistas en la lernado en la maljunula universitato kune kun sia edzo. Ŝi lernis ne nur la lecionojn pri belarto, kaligrafio kaj fotografio, sed eĉ ĉiujn aliajn, ne forlasante eĉ unu lecionhoron. Ŝi diris al mi: "Mi migradis pli ol duonon de la tuta vivo. Post emeritiĝo mi havas tempon kaj povas lerni sciojn, kiujn antaŭe mi volis sed ne povis ellerni, kaj fari ĉion, kion mi volis fari kaj ne finis pasintec. Ni ĉiuj ŝatas nian universitaton kaj dum la kolektiva leciono, la aŭlo ofte estas homplena. El la sanprotekta leciono por maljunulo mi eksciis, kiamaniere malfruiĝi la maljuniĝon. Mi klop-

dos por ke la 'viv-horloĝo' pli longe funkciu. Ankaŭ la leciono de komputero tre interesas min. Mia dua filo okupiĝas pri tiu ĉi profesio kaj nun inter ni estas komuna lingvo. En la muzika leciono, ni kantas kanton de juneco, kvazaŭ ni rejuniĝus."

Ding Ji kaj ŝia edzo lernis Esperanton en la tridekaj jaroj. Kiam ŝi informiĝis, ke mi estas raportisto de Esperanto-gazeto, ŝi ekscitite ekkantis en la ĉina lingvo la kanton pri Esperanto. Kvankam duonon de jarcento ŝi ne kontaktis Esperanton, tamen ŝi ankoraŭ kore amas nian lingvon. Ŝi plurfoje esprimis, ke se la universitato funkciigos Esperanto-kurson, ŝi certe sin anoncos la unua.

En la dua instruoregiono mi ĉeestis lecionon de belarto. Pli ol dudek belartaj amatoroj sidis ĉirkaŭ granda tablo. La lecionon donis Peng Ĝaŭĝjun, vicdekano de la belarta fakultato de la Ŝandong-a Arta Instituto. Same kiel aliaj invititaj instruistoj, Peng fervore subtenas la

Agronomoj kaj profesoroj de la maljunula universitato esploras en kampoj.



POR LA SANO DE LA INFANOJ

de MO FU

LA 7-a de aprilo estas la Internacia Higiena Tago. Ĝia temo ĉi-jara estis: "La sano de la infanoj — riĉaĵo de la morgaŭo." Tiu temo havas ekstreme profundan signifon: La infanoj estas la estontaj mastroj de la lando, investaĵoj por la sano de la infanoj rekte koncernas akceladon de socia disvolviĝo, altigon de produktaj fortoj kaj plibonigon de vivkondiĉoj.

La porinfana sanprotekta afero de Ĉinio stariĝis en la lastaj tridek jaroj. En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio la tuta lando

havis nur kvin infanajn hospitalojn, 139 malsaninfanajn litojn kaj malpli ol mil pediatrojn.

Dank' al la prizorgo de la popola registaro porinfanaj sanprotektaj organizoj establiĝis ĉie en la lando. Nun ni jam havas pli ol 30 000 pediatrojn, 90 000 malsaninfanajn litojn kaj 2 645 sanitarejojn por virinoj kaj infanoj. La urbaj kvartaloj havas siajn proprajn laborantojn por sanprotektado pri la infanoj, kaj la kamparo havas sanprotektan reton por virinoj kaj infanoj de la tri niveloj de gubernio, komunumo kaj brigado, kio

maljunulan edukadon. Por altigi la kapablon de lernantoj aprezi ĉinstilajn pentraĵojn, laŭ la karakteroj de maljunuloj, li kompilis instruan materialon de pli ol dek mil ideografiaĵoj. Tiam li, prenante bambuon kaj solpetalan hibiskofloron kiel ekzemplon, kaj faris modelan pentradon kaj klarigis la arton de liberstila pentrado. La lernantoj aŭskultis atenteme. Post leciono, iuj petis lin pentri bambuojn kaj florojn por hejma imitado.


Por ekzameni la sukcesojn de la lernantoj, la universitato okazigis la unuan ekspozicion de kaligrafaĵoj, pentraĵoj, envazaj pejzaĝoj kaj fotografiaĵoj. En nur duonmonato 119 lernantoj alportis tien 231 kaligrafaĵojn kaj pentraĵojn. Nun la maljunula universitato preparas fondi stud-rondon de kaligrafaĵoj kaj pentraĵoj, por ke la altnivelaj

lernantoj havu pluapaŝan progreson en la kaligrafio kaj pentrado.

Inter centoj da maljunaj lernantoj ja ne mankas talentuloj. Kiamaniere helpi ilin liberiĝi el la deprimateco de maljuniĝo por ke ili daŭre faru sian kontribuon al la socia disvolvo, tio estas ne nur problemo zorgata de la universitato, sed ankaŭ deziro de la lernantoj mem. Baldaŭ eklaboros la kuracejo de spertaj kuracistoj kaj flegistinoj el la lernantoj. Ĝi servos al la socio, antaŭ ĉio al la maljunuloj. La universitato fondos ankaŭ scienc-teknikan konsultan centron, interalie, la agrikultura scienc-teknika konsulta stacio, kun Ping'andjan-regiono en okcidenta antaŭurbo de Ĝjnan kiel la bazo, jam komencis sian servadon. Tiutage, kelkaj fakuloj faris esploron en kampoj, fruktoĝardeno kaj kalka farejo, respondis la demandojn

de kamparanoj kaj fine okazigis kunsidon, en kiu ili donis nemalmultajn valorajn proponojn pri disvolvo de multspeca ekonomio kaj realigo de la modernigo de la regiono. Ŝang Ĝongji, 81-jara pomologo, estis ĝoja pro tio, ke en siaj malfruaj jaroj li ankoraŭ havas la ŝancon fari sian kontribuon al la popolo. Li tuj esprimis: "Mi volonte liveros al vi informojn. Mi venos tuj, kiam vi min bezonos."

Adiaŭinte la maljunulan universitaton, mi informiĝis, ke nun en multaj provincoj kaj urboj de Ĉinio oni aktive preparas fondi maljunulan universitaton kaj antaŭ la fino de 1984 en nia lando naskiĝos sinsekve dekelkaj tiaj universitatoj. Kompreneble, tiu nombro estas tro malgranda por Ĉinio, kiu havas okdek milionojn da maljunuloj inter miliardo da loĝantoj, tamen tio estas bona komenco.



Intelekte debilaj infanoj en elektra aŭdo-vida leciono en la unua ĉina Esplora Centro de Infana Psikologio en Nankino

fidinde garantias la pluapaŝan disvolviĝon de la porinfana sanprotekta afero.

Ĉinio energie praktikas la principon de “prevento en la unua loko”, faras senpagan preventan injektadon al la infanoj kaj rezulte de tio fundamente regis kelkajn kontaĝajn malsanojn difektantajn la sanon de la infanoj. Samtempe kun tio, la registaro aparte emfazas la sanprotektan laboron por la infanoj en la kamparo, praktikas sisteman zorgadon al la malpli-ol-sepjaraj infanoj: starigi por ili arkivojn pri sanstato kaj fari regulan korpoekzamenon por ĝustatempe ŝtopi breĉojn kaj kuraci malsanojn tuj kiam ili aperos al ili. Por bone preventi rakiton kaj trofian anemion establiĝis preventa-esplora grupo, kiu ellaboris unuecajn normojn por diagnozo kaj preven-


tajn projektojn. Post plurjara klopodado la mortoprocenĵo pli kaj pli malaltiĝis kaj malkreskis de 200% en la unuaj jaroj post la Liberiĝo ĝis 34.68% en 1981. La meznombraj alteco kaj korpopezo de la knabetoj en diversaj aĝoj de la urboj kaj kamparo superis tiujn en la komenca tempo post la fondiĝo de la popola respubliko. Ekzemple, la meznombraj alteco kaj korpopezo de la naŭjaraj infanoj en Pekino, Nankino kaj Kantonno, kiuj reprezentas respektive nordan, centran kaj sudan Ĉinion, kreskis respektive je 5.4 cm. kaj 2.4 kg. por knabetoj kaj je 5.7 cm. kaj 2.2 kg. por knabinoj.

Ĉinio plifortigis ankaŭ la infanvartan laboron, funkciigis diversspecajn vartejojn kaj infanĝardenojn, ellaboris “La Regularon por Vartejoj” kaj “La Higienan kaj Sanprotektan Regularon por Vartejoj kaj Infanĝardenoj”, ke la infanoj sane kresku en bona kolektivo.

La puerpera sanprotektado estas nova branĉo scienca, kiu rapide progresis en Ĉinio dum la lastaj jaroj kaj, kuniginte sanprotektadon al la gravedaj virinoj kaj tiun al la infanoj, ludas gravan rolon por malgrandigi la mortoprocenĵojn de fetoj kaj beboj.

Nun Ĉinio pluapaŝe mobilizas la tutan socion, por ke ĝi subtenu la sanprotektadon al la infanoj per homfortoj, materialoj kaj financoj, kiel starigi aŭ kompletigi organizojn por sanprotektado al la infanoj, plimultigi malsaninfanajn litojn, kulturaj vartistoj kaj laborantojn pri infana sanprotekto kaj kun plena energio popularigi sciencajn sciojn pri bebnutrado kun la celo krei pli bonajn kondiĉojn por la sano de la infanoj.

Sanprotekta sekcio de la Pekina Dua Tekstila Fabriko periode ekzamenas infanojn de la laboristoj.



VARMA PLUVETO

(NOVELO)

Ilustraĵoj de ĜAŬ ĜJUNSENG

HODIAŬ li forlasas la fabrikon pli frue je dek minutoj por rendevuo je la 6-a vespere. En 40 minutoj li devos veturi dufoje, poste paŝe serĉi tiun nekonatan strateton. Li do rapidas kaj rapidas.

La sesa, horo nek frua nek malfrua, ĝuste por preni vespermanĝon. Ĉu decas tion fari en alies hejmo? Neniu konata. Kia embaraso! Fordanki kaj diri, ke la vespermanĝo jam prenita? Dume kun malplena stomako rigardi aliajn manĝi? Kia malagrablo! “Mi, lernanto de via onklo. Mia nomo, Li Ĝŭangnan,” iu sin konigis telefone. La voĉo sopraneca. La telefoninto, ŝajne virino. “La afero, kiun li konfidis al mi. . .” Kia afero? Li sin demandas kaj dronas en medito. Nenian aferon lia onklo menciis. La onklo haste venis pro ofica afero, kaj ankaŭ haste foriris, nur momenton en lia hejmo.

Li demetas la aŭdilon kaj ekkomprenas. La sesa horo. Li gravuras ĝin en la memoron. Oni ne devas malfrui al tia rendevuo.

Denove pluvetas. Li ne kunportas ombrelon. Fakte tia ŝirmilo ne helpas. Tia maja vetero estas nur en la sudo de Jangzrivero. Jen pluveto, kaj ne pluveto: kvazaŭ nebulo, kvazaŭ vaporo aŭ humida vento. Ĝi flirtas, ŝvebas, subite aperas kaj neatendite ĉesas. Ĝi ne falas, sed de ĉiuj flankoj alnaĝas kirli-

ĝante. Foje ĝi ruliĝas supren laŭ vento kaj frapas la vangojn kaj mentonon, varme, karese, kvazaŭ karnodika kaj arda mano de giganto, milde, tenere. . .

Apenaŭ li atingas trolebusan haltejon de la 13-a linio, tri veturiloj alvenas tuj unu post alia. Bona aŭguro! Li sereniĝas.

“Sinjoro instruisto Peng! Peng Pej. . . ĉi tien!” aŭdiĝas dolĉa krio en trolebuso.

“Ha, Ŝjaŭ Je!” surprizite li krias.

“Tingting, cedu la lokon al la onklo!” diras Ŝjaŭ Je al sia filino.

La knabino devigite leviĝas, ĵetinte rigardon al Peng Pej.

“Via filino?”


“Jes. Jam 18-jara.”

La knabino, fidela portreto de la patrino: delikata, svelta, kun rigardo ĉiam fiera. Sed la originalo jam duoble grandiĝis, ĝis kreviĝa grado.

“Jam de longe mi ne vidis vin. Hej! Vi — kia via afero?” ŝi intime demandas, proksimiĝante la kapon al li. Ŝia hararo freŝe frizita — milda parfumo.

Ĉe renkontiĝo ĉiu konato lin tiel demandas, kun la sama signifo. Sed la demando de Ŝjaŭ Je entenas ankaŭ rimorson.

Tiam ŝi estis kontrolistino, unu el la malmultaj elstaraj knabinoj en la maŝinriparejo. Peng Pej laboris kiel instruisto en la vespera lernejo de la riparejo. Ekzamenante ŝian lernadon, li donis sekrete sian amon al ŝi, ke ŝi kontrolu. Ŝia kalibrilo estis fajna, ekzakta, sed la normo ĉiam variis. Foje Peng Pej povus ricevi la markon norman. Sed ŝi subite apatiĝis pro ia bagatelo. Poste ŝi edziniĝis al brava oficiro. La kolegoj gustumis ŝiajn nuptobombonojn kaj jam ne vidis ŝin plu. Kaj li eĉ ŝian adiaŭon ne aŭdis. Li vidis nur la foriĝantan silueton, feliĉegan, kaj pro tio ekstreme fieran.



Lin atakis malespero, aflikto kaj. . . kaj li tute ne atendis, ke el la unua maltrafo sekvas la postaj. Vidu, kvazaŭ interkonsentite, la knabinoj de la riparejo jam havas familion, unu post alia, almenaŭ fianĉon. Poste alvenis novaj metilernantoj, kaj iu knabino eĉ nomis lin onklo. Ah! Li surpriziĝis de tio.

En la maŝinriparejo nur iom pli ol 600 personoj, tiel malgranda la tereno. Ĉiutage li iris al la laboro kaj de la laboro, preparis lecionon kaj ĝin donis. Poste la vespera lernejo ĉesis, kaj li servis en la laborista sindikato. Lia tereno, ankoraŭ pli malgranda. Li staris jam sur la sojlo de la 30-jara aĝo. Ĉiuj zorgis pri li. Kaj jen rendezuo sekvis rendezuon. Emocio, maltrankvilo, konsterno. Post pluraj rendezuoj kun tiu kaj tiu de la alia sekso, li kutimiĝis, iĝis sperta, sed ankaŭ indiferenta. Kaj pli poste li jam ektimis. Ju pli aĝa, des pli kaŝema. Konatigo, sinprezento, daŭra konado, trafemaltrafo, . . . unu fojon en du semajnoj, serĉi vortojn, rompi la kapon, atente kaj timeme elbuŝigi. . . por penetri en la koron de la alia. Pasis duonjaro, ambaŭ ne elŝiriĝis ankoraŭ el perplekso kaj hezito. Jam printempo, kaj ĉiu el la du fariĝis unu jaron pli aĝa. . .

“Panjo!” la filino de Ŝjaŭ Je jam sin premas ĝis la pordo de la trolebuso.

“Ho jes, ni jam devas elbusiĝi. Estu pacienca, Peng Pej. Bona afero plena de tuberoj. Vi sukcesos.” Ŝjaŭ Je pene traŝiĝas al la pordo kaj returnas la kapon aldonante: “La normo ne estu tro alta!”

Amara rido ekludas sur la vizaĝo de Peng Pej. Normo? Iam,

jes, kaj eĉ ne malalta. Sed nun? Li jam deklaris duonpublike, ke li ne rifuzos konsideri eĉ tiun, kiu eksedziniĝis dufoje kaj havas du infanojn. Se ekzistas ankoraŭ io, tio estas, ke li postulas interkomprenon. Kaj nur tio. For eĉ la interkompreno? Por kio do vivi kune?

Malfacile, ege malfacile! Io apartigas la homojn. Ŝajne, malproksime unu de alia. . .

Jam la strateto, nomata Muelilo. Li malrapidigas la paŝojn. La strateto antikveca, mallarĝa, kvieta. La nomo ne trompas: kurba, etendiĝanta ĉiam en sama flanko, kaj kvazaŭ senfina. Staras samaj malnovaj domoj, kun tegmento tegita per herbaĉoj kaj muroj per musko. Estas duetaĝa domo, sur kies tegmentrando velkas gravuritaj floroj kaj pendas rusta sonorilo; la gablo ribeleme elŝoviĝas kaj minacas fali, apogite per du dikaj fostoj. Ĉiu preterpasanto ektimas ĝin.

La serĉata numero proksimiĝas pli kaj pli. Antaŭ iu pordo staras blankhara maljunulo, kun streĉita ombrelo super la kapo. Li aspektas kiel erudito.

“Vi estas Peng Pej?” demandas la maljunulo, farante paŝojn antaŭen. La voĉo estas sopranecca.

“Kaj vi? . . .”

“Li Gŭangnan.”

La sopranulo aspektas pli maljuna ol lia onklo.

Li etendas la ombrelon al Peng Pej, anstataŭ lin inviti en la hejmon. Tuj poste li elpoŝiĝas naztukon kaj forviŝas pluve-rojn de sur la miopulaj okulvitroj.

“Sekvu min!”

“Ki. . . kien?”

“Al la hejmo de mia kolego. La fraŭlinon li svatas. Kaj mi vin detale konigis. . . Ho jes, ankaŭ via onklo ne bone scias. Bonvolu diri, kiomjara vi estas. 41 aŭ 42?”

“43.”

“Hm, tion. . .” li obtuze rimarkigas, “vi devas korekti okaze de. . .”

“Bone.”

“Tre gravas. . .” daŭrigas la maljunulo. Lia mieno serioza, paŝoj firmaj, kvazaŭ por ĉeesti solenan interparoladon koncernantan la ŝtaton kaj la popolon. Vidinte tion, Peng Pej preskaŭ ekridas.

“Ne malproksime, nur je tri haltejoj,” diras la maljunulo, signante per tri mincaj fingroj, kiam ili atingas aŭtobusan haltejon.

“Tio ĝenas vin!” Peng Pej sentas ŝuldon al li.

“Ne, tute ne. Afero grava por la tuta vivo! Ankaŭ via onklo ege maltrankvilas. . .”

Buso venas. Homoj svarmas enen. Sinjoro Li Gŭangnan, ne cedante antaŭ la fortuloj, tuj sin premas en la homamason. Peng Pej intencas lin gardi, sed ne kuraĝas forte puŝi lin, cetere la ombrelo tre ĝenas. Li malsukcesas, kaj ambaŭ restas ekster la fermita pordo.

Jen alia buso. Sed denove la samo.

La maljunulo ekridas kaj konsolas lin: “Tempo tuj post laboro. Jen tiel nomataj horoj de kulmino. Ne gravas. Ni atendu plu. . .”

Ili sukcesas eniĝi en la trian buson, se la kinejo trans la strato ne finus projekcion ĝuste en tiu momento.

Peng Pej ekkompatas kaj diras: "Bonvolu lasi. Mi sola iru. La adreson?"

"Mi povus atendi la kvaran. . ." grumblas kolere la maljunulo. "Sed la tempo! Je la 7-a la rendevuo. Kaj nun, jam la 6-a kaj 40 minutoj."

Li do sciigas al li la adreson. Li diras, ke estas la tria enirejo, la tria, se kalkuli ekde la lasta; la unua, se nombri ekde la unua. Li diras, ke estas la tria etaĝo, la maldekstra pordo, do, nek la dekstra nek la meza. Li diras, ke la kolego havas la familian nomon Ĉeng signifantan sukceson. Li diras, ke Peng Pej nomu lin Laŭ Ĉeng. Li diras, ke tiu ĉi ricevos inĝenieran titolon poste. Fine li diras, ke Peng Pej ne forgesu korekti la miskonigon de la aĝo. . .

Je la 7-a kaj kvin minutoj Peng Pej atingas la trian etaĝon de la tria enirejo, baniĝante en ŝvito. Aŭdiĝas kverelo. Kion fari?

"Tro da kolero oni jam verŝis sur min ekstere. Kaj nun, en la hejmo, vi. . ." voĉo de viro, indigna.


"Kaj hejme vi jam povas aroganti? Superŝuti la edzinon per via senkaŭza kolero? Mi, via servistino? Sklavino?. . ." voĉo de virino, vitroskrape agaca.

"Kiu faras vin sklavino? Hodiaŭ la vestojn. . ."

"La vestojn? Nur kelkajn vi lavis. Ĉu jam tro? Ĉu mi eliris promeni? La redakcio invitis verkistajn moŝtojn kaj . . . kaj mi eĉ la plej bonajn cigaredojn ne sukcesis havigi por ili!. . ."

La bruado fendas ĝuste la maldekstran pordon.

Peng Pej tuj forkurus, se li ne rememorus la trudan kaj seri-



ozan mienon de sinjoro Li Gŭangnan. Post unuminuta hezito li ekmordas la dentojn kaj krio tondras el lia buŝo: "Ĉu sinjoro Laŭ Ĉeng hejme?"

Subite eksilentas la ĉambro, eble pro lia laŭta krio. La pordo oscedas post momento.

"Ha! Peng Pej? Bonvolu enveni! Bonvolu!" La mastrino faras ridetan mienon kaj mildigas la voĉon.

Kaj la mastro? Li viŝas la manojn per la antaŭtuko kaj tuj afable kaj varme kaptas tiujn de Peng Pej.

Kaj la mastrino gracie forturiĝas kaj denove aperas kun taso en mano. Kiam ŝi pinĉas teon el ujo kaj metas ĝin en la tason, la mastro tuj verŝas akvon el termosoj. Kiam la mastrino prezentas cigaredon, la mastro jam bruligas alumeton. Kia akordo! Kia harmonia paro, ke Peng devas suspekti, ke lia ĵusa aŭdo estas misa!

"La knabino estas amikino de mia bofratino. Teknikistino de

ĵerza fabriko. Diplomito el faka kolegio. 33-jara. . ." konigas la mastrino afable kaj ĝentile.

"Ni jam detale informiĝis pri vi de sinjoro Li Gŭangnan. Bela paro por. . ." tuj aldonas la mastro.

Peng Pej silente lipas la teon. Li eksentas turmentan malplenon en la stomako. Li pene sin konsolas, ke baldaŭ tiu venos. Fraŭlino ĉiam emas gardi sian dignon per konvena malfruiĝo. Tion li jam multe spertis.

La mastrino haste ŝanĝas la veston kaj ekkombas la harojn. Laŭ Ĉeng proksimiĝas al ŝi kaj dolĉe flustras: "Pluvas. Mi iru anstataŭ vi."

"Ne. Jam estis interkonsentite, ke mi iru," ŝi pepas ĉarme ride-tante.

"Ne, ne! Ĵus vi diris, ke via stomako doloras. Tion kaŭzas certe la veteraĉo. Lasu, ke mi iru! Mi!" La edzo milde elŝiras la kombilon el ŝia mano.

"Vi eliros?" ridetas Peng Pej, rigardante la intiman paron.

“Kun vi! La knabino — he, kia nomo? — En la hejmo de ŝia frato. Je la oka.”

La rideto de Peng Pej glaciigas sur la vizaĝo. Li sin levias rezignacie.

“Via vesto, sinjoro Peng, ne konvenas,” ekkrias la mastrino. “Jam neniu portas tian grizaĉan uniformon por rendevuo kun fraŭlino. Cetere, ĝi jam malsekiĝis de la pluvo. Ne decas!”

“Jes, jes!” aprobe diras Laŭ Ĉeng. “Iom tro modesta vesto. Se antaŭ kelkaj jaroj. . .”

La mastrino senhezite elprenas malhele bluan elegantan veston el ŝranko. “Venu! Bonvolu surmeti, ke ni vidu, ĉu ĝi bone sidas,” ŝi alvokas.

“Ne, ne! Jam tro ĝenas vin! Mi. . .”

“Nenio! Estu kiel hejme! Grava afero por la estonteco. Ne rigardu ĝin kiel bagatelon, sinjoro Peng!”

Tia komplezemo devigas lin surmeti la veston. Ha, iom tro loza, tiom tro longa. Sed la mastrino diras: “Jes. Viro ja devas porti pli grandan veston, ĉar nur tiel li povas esti pli vireca, pli eleganta, pli moderna. Bone, tre bone. . .” ŝi portas lian malsekan veston en la kuirejon por ĝin lavi. “Rapide! Kaj ne forgesu la ombrelon!”

Post kiam ili estas jam ekster la tria enirejo, Laŭ Ĉeng rompas la silenton: “Vi tro malaktiva, frateto! Pro kio vi ankoraŭ ne edziĝis? Ja komprenebla, tikla afero. Nu, ekzemple mi, serĉis, elektis, amis, sed denove fraŭlo, kvazaŭ formiko en arda poto; fine trafis, sukcesis, kaj edziĝis. Kaj la rezulto? Ve! Kvereleto en tri tagoj kaj kvereleto en kvin. Ne pensu, ke ŝi estas afabla, bonkora. Tia ŝi sin montras nur an-

taŭ gastoj kaj aliaj. Malfacile kunvivi kun tia eksplodema ino. Jen ŝi krias el la tuta gorĝo: ‘Mi, virino kun memstara personeco!’ Aŭdu, kiaj vortoj! He! Nur konfistino en kultura federacio jam snobe imitas la verkistinojn! Kaj la edzo devas submetiĝi al ŝi! . . .” Li ellasas ĝemon kaj daŭrigas, turnante la paroltemon: “Tio jam estas alia afero. Fakte nenia motivo vivi ĉiam fraŭle. Oni vivas en la mondo, sen familio, kia ordo? Vere, kverelo, bruoj, sed familio estas familio. . . Ne ridu, frateto! Mi diras sincere.”

Peng Pej tute ne ridas. Li atente aŭskultas kaj pripensas. Sed Laŭ Ĉeng mem eksplodas per rido, kvazaŭ senkulpigante sin pri la malkaŝemo kaj kontraŭdireco.

Ili ascendas en trolebuson de la 13-a linio.

Elirinte el la trolebuso Peng Pej rimarkas, ke tio estas la haltejo antaŭ la maŝinriparejo. Kio? Post longa veturo, revene al la deirpunkto!

La hejmo de la bofrato de Laŭ Ĉeng situas en la strateto ĉe la riparejo. La vizaĝoj de la mastro kaj mastrino ne estas fremdaj al Peng Pej, eble pro la ofta renkontiĝo survoje. En la angulo de la ĉambro sidas sofo, kiu paciencie eltenas la pezon de fraŭlino, okupiĝanta pri diktafono. Laŭ Ĉeng konigas Peng Pej kaj la mastrino la fraŭlinon. Tiu ĉi sendas dignan rideton kaj tuj klinas la kapon al kasetoj.

“La pluvo, sufoka. . .”

Komenci per la vetero, jen la rutino. Poste la temo saltas al fabriko, premio, al reformado de la administra sistemo de Ĉinio. Poste oni babilas pri s-ino Thatcher, pri la Ĉina Virina Flugpil-

ka Teamo, pri la savo de dronanto far gravedulino, pri la mantelo de la heroo kaj heroino en nova filmo. . . Peng Pej tenas la rideton en konvena grado kaj toleras heroe la pikadon de la laneroj de la nova vesto ĉe la kolo kaj manoj, sed la malheroa stomako ĉiam kolere bruas. Feliĉe nur li mem aŭdas. Li memoras la vortojn de Li Gŭangnan kaj atendas oportunun por fari deklaron pri la korekto. Sed bedaŭrinde la temo de la bablado flugas al la universo kaj tute ne revenas por tuŝi la heroon kaj heroinon en la ĉambro.

La heroino — Peng Pej ne klare aŭdis la nomon, ĉu Sun aŭ Song, — firme katenas la langon. Ŝi distriĝeme kaj ŝajne absorbite fiksas la rigardon sur la titoloj de la kasetoj. Ŝi neglektas ĉion kaj ĉiujn ĉirkaŭ si. Kaj Peng Pej jam komprenas, ke ŝi tute ne interesiĝas pri li. Li ne sentas malesperon, ĉar li venis kun nenia espero. Li nur brule atendas la finon de la sceno.

Kaj fine, la heroino ŝovas elektitan kaseton en la diktafonon. Aŭdiĝas kortuŝa kanto:

Ne demandu, de kie mi venis!

Mia naskolok' en malproksim'.

Kial vagabonde mi min trenis?

. . .

Ĉesas la babilo. Ĉiuj silentas. La rigardo de la fraŭlino fokusas al siaj piedpintoj, ŝi kvazaŭ sinkus en la misteron de la kanto. Finiĝas la kanto. Ŝi rapide karesas la harojn kaj leviĝas.

“Mi foriru!” ŝia voĉo sonora, pli juna ol ŝi mem. Ŝi donas la rideton al ĉiuj, iom ĝene. Ŝia rigardo sin direktas al Peng Pej kaj haltas sur li, manifestante

apenaŭ rimarkeblan pardoneton. Tio rememorigas al li pri Ŝjaŭ Je.

Nun aŭdiĝas unuvoĉe la vortoj de la svatantoj: “Bonvolu akompani ŝin, Peng Pej!”

Peng Pej sin levas flegme. Li jam eksentas facilecon en la koro.

Kun la sama mieno la fraŭlino eliĝas tra la pordo. Neniu el ili malfermas la buŝon. Ŝajnas al Peng Pej, ke la strateto multe pli longas ol kiam li alvenis.

Ĉe la fino de la strateto leviĝas konstruata loĝdomo. Skafaladoj altaj. Kirlomaŝino brua. Lampoj blindigaj; noktoskipanoj viglaj. Ŝi malrapidigas la paŝojn kaj levas la kapon, kvazaŭ ŝi volus scii, kiom da etaĝoj en la konstruata domo.

Hela lumo ŝin kloŝas, kaj Peng Pej vidas, ke ŝi, kvankam ne ĉarma, aspektas ne turpa, kun konturo gracia. Neniom timinda la fiero el ŝiaj okuloj. Sulketoj jam evidentiĝas ĉe ŝiaj okulanguloj. Kaj la tuta vizaĝo, oni ne scias kial, tiom palas kaj apatias.

“Ĉie novaj domoj konstruataj, sed neniam sufiĉas,” ŝi diras medite.

“Jes, vere. La loĝantaro. . . tro multiĝis. . .” li mallerte transprenas la fadenon. En lia kapo kirliĝas alia penso: Vere, ĉie novaj domoj, sed kiu el ili apartenas al mi? Li ĉiam tiel demandas sin, vidante novajn domojn. Kaj renkontiĝante kun virinoj, li faras al si la saman demandon: Ĉie fraŭlinoj, sed kiu el ili apartenas al mi? Li instinkte ĵetas rigardon al la fraŭlino apud si. Ŝi transpasas flakon atente kaj jam estas antaŭ li. Malhele ruĝaj ledŝuoj kun kalkanumoj ne tro altaj; la ŝuoj tu-

te novaj, sed ŝajne jam ne modaj. “Mi prenos trolebuson ĉi tie,” ŝi montras la haltejon.

Bone! Baldaŭ ĉio finita! Dudek paŝojn antaŭen, kaj halt! Poste en trolebuson kaj “Ĝis la revido!” — fakte sen revido! Peng Pej sentas vakuan facilecon.

Tiam li aŭdas kvazaŭ mallaŭtan suspiron de tiu, kiu ĵus demetis pezan ŝarĝon. Li tre miras, ĉar ankaŭ li mem tian faras.

“Finfine. . . ĉio finita,” tiuj vortoj elglitas el lia buŝo.

La fraŭlino ekridetas, kun iom da reteno, iom da sarkasmo.

“Jam laca. . .”

Ŝi kapjesas kunsente.

“Ve, kia banalo!” li forĵetas sian bridon kaj elverŝas la tutan koron: “Kia rendevuo? En fremda loko. Prezento fare de nekonataj homoj. Fakte krom la unuaj linioj el la papero de vivhistorio, jam nenion alian ili scias. Ridinde! Jes. Sed necesas tiel agi. Tio estas nur aktorado. Kion fari? Ĉiu opinias, ke tia procedo absolute necesas. Iuj vin konvinkas ĉiamaniere. Ili estas bonaj, sinceraj kaj helpemaj. Laŭ Ĉeng kaj lia edzino eĉ devigis min porti ĉi veston. . .”

Li haltas. Kio do? Kial plendi antaŭ fraŭlino? Jam neniam revido, kial do tiajn adiaŭajn vortojn, tute ne ĝentilajn? Li rigardas ŝin pardonpete. Sed tute ekster lia atendo, ŝia vizaĝo ekradias kaj ŝi ĝoje krias:

“Prave, pravege vi diris! Tute senerare! Nun mi sentas, ĝuste kiel vi diris. Ĉio sensenca. Ĉio por plenumo, por aliaj, por la gepatroj, la parencoj, amikoj! Por tiom da bonkoraj, ĉiam vin zorgantaj homoj! La mastro ne konis vin. La mastrinon mi konis

pli frue ol vi nur je kvaronhoro. Vere! Ŝi estas amikino de mia fratino. Ŝi eĉ insistis kaŝi mian veran aĝon, jes, ŝi forprenis du jarojn el mia aĝo. Kompreneble, ŝi bonintenca, centpocente bonintenca. Sed mi, mi sentas nur tedon! . . .”

El ŝiaj okuloj glimas malkaŝemo, emocio kaj sincereco. Ĉio ĉi tute konsternas Peng Pej. Al li ŝajnas, ke li hazarde trovis, kion li aspiris kaj serĉis, sed ne havis. Li ne scias kion diri, kvankam la vortoj ruliĝas jam sur la langon.

Subite aperas du faskoj da lumoj. Jen trolebuso. Ŝi rigardas sian brakhorloĝon kaj mallaŭte diras post ioma hezito: “Jam post la naŭa. Ĝis! Mi. . . mi ankoraŭ ne prenis vespermanĝon!” ŝi ekridas, ruĝiĝante de honto. La fiero, kiu paradis antaŭ kelkaj minutoj, nun jam for, tute for.

Ankaŭ Peng Pej ekridas, mute. Li volas regali ŝin per nokta lunĉo, ĉar proksime troviĝas malgranda restoracio. Huntuno kun piproleo, vere bongusta. Sed domaĝe la manĝejo jam fermiĝis. Do, venontfoje! Li haste demandas: “Kie via hejmo. . .”

“En la strateto Muelilo. . .” ŝi donas la numeron. Svinginte la manon ŝi sagas al la trolebuso. Peng Pej stuporiĝis. Kio? La antikveca, mallarĝa, ĉiam flankeniĝanta strateto; la musko, la herbaĉoj sur la tegmento; la gablo apogita per fostoj, la rusta sonorilo, la gravuritaj floroj sur la tegmentrando, kaj. . . ĉio klaras antaŭ la okuloj!

Denove pluveto, ŝvebe, flirte, nebulece. . . Peng Pej levas la kapon kaj kore akceptas la aman kaj dolĉan karesadon de la varma pluveto. Li staras tiel, longe, longe, longe. . .

ĜU ĜJANHŬA LA TRIAN FOJON ROMPIS LA MONDAN REKORDON

La 10-an de junio, 1984, ĉina sportisto, 21-jara Ĝu Ĝjanhŭa sukcese transsaltis la altecon de 2.39 metroj en la Internacia Altosalta Konkurso okazinta en FR Germanio. En junio kaj septembro pasintjare, li transsaltis la altecojn de 2.37 kaj 2.38 metroj respektive, kaj dufoje rompis la mondan rekordon.

OLEKAMPO KARAMAJ ETENDIĜAS AL NOVAJ KAMPOJ

La olekampo Karamaj en Ŝinĝjang de Ĉinio nun etendiĝas al novaj kampoj. En la lastaj kvar jaroj, sur tiu olekampo oni boris putojn je proksimume 500 000 metroj, kaj la jara produktokvanto de nafto superis kvar milionojn da tunoj.

Karamaj situas en nordokcidento de Ĝunggar-baseno kaj okupas 130 000 kvadratajn kilometrojn. Antaŭe tie estis dezerto. Nun ĝi jam fariĝis grava energia bazo en nordokcidenta Ĉinio dank' al la konstruado de diversnaciecaj poloj.

Vizitantoj de la Pekina Ekspozicio de Internaciaj Floroj



SURAKVA AKVOFABRIKO

En la urbo Uhu, Anhuĵ-provinco, estas surakva akvofabriko kun taga produktokvanto de 35 000 tunoj da akvo. Ĝi estas unu el la plej grandaj surakvaj akvofabrikoj de Ĉinio. Ĝi ekfunkciis en la 1-a de julio, 1982, kaj laboras ĉiam normale.

La fabriko staras sur Jangzi-rivero. Ĝiaj ekipaĵoj de la akvaj ĉerpado, purigado kaj elpumpado, loĝejoj, manĝejoj kaj amuzejoj de oficistoj kaj laboristoj, kaj ankaŭ oficejoj ĉiuj estis instalitaj sur cementa ŝipo. La purigita akvo estas transkondukata al tubaro tra la tubo sur kajo. Tiu surakva akvofabriko postulis malmulte da investo kaj mallongan konstruan tempon kaj povas facile moviĝi.

ESPLORA CENTRO DE INFANA PSIKOLOGIA HIGIENO EN NANKINO

La Esplora Centro de Infana Psikologia Higieno, la unua tiufanka esplora bazo en Ĉinio, finkonstruiĝis en Nankino kaj oficiale ekfunkciis la 1-an de junio.

La centro faras medicinan esploron kaj instruadon, inkluzive de konsulto pri genetiko ĉe infanoj, psikologia ekzameno, direkto al la infanaj kondutoj, kompilado de instruaj materialoj

kaj faro de instruaj instrumentoj, kaj klopodos trovi la metodon kombini la kuracadon kaj edukon al intelekto malfruiĝintaj infanoj por krei al ili la eblecon viziti elementan lernejon kaj partopreni en socia produktado kiam ili plenkreskiĝos.

RESANIGI LEŬKEMIULON PER GREFTO DE FETA HEPATO

La Hospitalo Ĉanghaj sub la Dua Armea Medicina Universitato de Ŝanhajo savis 14-jaran leŭkemiulon per grefto de feta hepato.

La knabo akceptis la grefton en majo, pasintjare. Tri monatojn post la operacio li elhospitaliĝis kaj revizitis lernejon. Li jam pasigis pli ol unu sekuran jaron. Li estas la unua leŭkemiulo ricevinta tian grefton en Ĉinio kaj ankaŭ unu el la plej longevivintaj operaciitaj leŭkemiuloj en la mondo.

VALORAJ PENTRAĴOJ DEDIĈITAJ AL LA HANDIKAPULA FONDUSO

La 18-an de junio, en la Ĉina Belarta Eksponejo de Pekino eksponejis pentraĵoj de 67 famaj pentristoj, inter kiuj estas U Zŭoĵen, Hŭa Ĝjun-u, Li Keĵan kaj Liŭ Hajsu. Ili dediĉis tiujn altvalorajn pentraĵojn al la Ĉina Handikapula Fonduso.

*Ora monero de
granda pando.
Maldekstre estas
ĝia fronto kaj
dekstre ĝia dorso.*



LA UNUA EKSPOZICIO DE INTERNACIAJ FLOROJ EN PEKINO

Meze de junio, en la parko Bejhaj de Pekino eksponiĝis proksimume 2 000 vazoj da famaj floroj el Nederlando, Singapuro, Tajlando, Malajzio, Italio, Danlando, Japanio kaj Hongkongo. Tio estis la unua ekspozicio de internaciaj floroj okazinta en Pekino. La vizitantoj superis 10 000 meznombre ĉiutage.


ĈINA ORA MONERO DE GRANDA PANDO

La 25-an de majo, la Ĉina Popola Banko, Ĉina Mon-fara Kompanio kaj Ĉina Asocio por Protekti Sovaĝajn Bestojn proklamis, ke Ĉinio emisios eksterlanden grandan oran moneron de granda pando. Sur la fronto de la monero estas fama konstruaĵo Ĉinjan-halo en Parko de la Ĉiela Altaro de Pekino, kaj sur la dorso, granda pando kun verda bambuo. La monero havas 70 milimetrojn en diametro kaj entenas puran oron je 12 uncoj. La nominala valoro estas mil jŭanoj de Ĵenminbi. Ĝi estas la plej granda el la memoraj oraj moneroj emisitaj de Ĉinio.

Antaŭ nelonge, malsato serioze minacis la grandajn pandojn de Ĉinio. Tio vekis atenton de la tuta lando. Samtempe kun emisio de la ora monero, la Ĉina Mon-fara Kompanio dediĉis 100 000 jŭanojn de Ĵenminbi por savi la grandajn pandojn.



En 1986 vin bonvenigos la kongresa urbo



Pitoreska Pekino

La libreto, kun mapo, pentraĵoj kaj koloraj fotoj, konigas al vi pli ol dudek vidindejojn.

Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Formato: 132×186mm. 74 pĝ. broŝ.

Prezo: £0,95 US\$ 2,00

Numero: 17-Es-1827P

Mendu ĉe: Libroservo de UEA

Perantoj de EPC

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

POLITIKO KAJ EKONOMIO DE MING-DINASTIO

de BA HONG



*Imperiestro Tajzu
de Ming-dinastio*

LA POLITIKO POR EKONOMIA REBONIGO

Post la kamparana milito en la lastaj jaroj de Ĵuan-dinastio, multaj nobeloj, burokratoj kaj bienujoj mortis aŭ fuĝis aliloken, kaj la agroj, kiujn ili rabis al si siatempe, aŭ dezertiĝis aŭ revenis en la manon de kamparanoj. Por reordigi la produktadon la imperiestro Tajzu (sur trono en 1368-1398 p. K.) ordonis la kamparanojn reiri al agrokulturo, agnoskis al ili la posedantecon super la de ili ekspluatitaj kampoj, senigis tri-jaran ter-imposton kaj

tute ne impostis la kampojn ekspluatitajn ekster la difinita kvanto. Rezulte de tio, en 1393, en la tuta lando jam troviĝis 57 milionoj da hektaroj da agroj, kaj sur multaj dezertiĝintaj kampoj reaperis plantoj de grenoj, kotonoj kaj kanabo.

Laŭ la imperiestra edikto, ankaŭ la garnizonoj tra la lando entreprenis agrokulturon. Ĉe la landlimoj tri dekonoj de la militistoj sin okupis pri gardado, dum sep dekonoj pri agrokulturo; en la landinterno du dekonoj pri gardado, dum ok dekonoj pri agrokulturo. En la unuaj 60-70 jaroj de Ming-dinastio la armeo proviantigis fundamente per si mem, tiel ke malpeziĝis la ŝarĝo de la popolo.

La imperiestro sendis siajn subulojn al diversaj lokoj de la lando por kolekti la lokajn oficistojn kaj kamparanojn al konstruado kaj reordigo de irigaciaj instalaĵoj en kampare malstreĉitaj sezonoj. Oni konstruis kaj reordigis 40 000 malgrandajn akvorezervejojn, 4 000 kanaletojn kaj 5 000 digojn kaj ĉie faris irigacian konstruadon. Ĉio ĉi ludis pozitivan rolon en la reordigo kaj disvolvo de agrikultura produktado.

LA KONSTRUADO DE PEKINO KAJ LA GRANDA MURO

Post la falo de Ĵuan-dinastio la mongoloj retiriĝis norden de la Granda Muro, sed ankoraŭ kun konsiderinda forto. Ĝi plurfoje direktis sian lancopinton suden kontraŭ Ming-imperio. Por fortigi la nordan defendon, la imperiestro Ĉengzu (1403-1425 p. K. sur trono) decidis konstrui Pekinon en politikan kaj militfortan centron. En 1406 la registaro komencis la preparadon por la konstruo de Pekino. Diversaj eminentaj metiistoj kaj miloj kaj dekmiloj da laboruloj estis rekviziitaj el ĉiuj anguloj de la lando al Pekino.

En 1417 la konstruado oficiale komenciĝis. Post pli ol tri jaroj stariĝis la urbomuroj kaj palacoj de Pekino.

Pekino estis ĉirkaŭita de trioblaj muregoj. En la urbocentro ĉirkaŭita de la plej interna murego estis palaca urbeto, aŭ la Malpermesita Urbo. Kun multe da grandiozaj haloj, ĝi kovris areon de 300 000 kvadrataj metroj. La konstruaĵoj tie aspektis aparte elegantaj sur blankmarmoraj bazamentoj kun blankmar-



Tajhe-halo en la Imperiestra Palaco

moraj balustradoj. Iliaj kolonoj, pordoj kaj fenestroj ĉiuj estis ruĝe lakitaj, iliaj traboj kovritaj per pentraĵoj el blua kaj verda koloroj kaj la tegmentoj el flave glazuritaj tegoloj. Interalie la haloj Fengtjan (la nuna Tajhe), Hŭagaj (la nuna Ĝonghe) kaj Ĝinŝen (la nuna Baŭhe) estis la ĉefaj haloj starantaj en la centro, kun areo de 87 000 kvadrataj metroj. Krom la haloj en la Malpermesita Urbo, konstruiĝis ankaŭ altaroj por kulto la ĉielon, prapatrojn kaj diojn de la tero, grenoj, monto kaj rivero kaj Ĉengtjan-pordego (la nuna Tjan'anmen-pordego), kiu estis ĉe la fronto de la Malpermesita Urbo. Antaŭ kaj malantaŭ la pordego staris po paro da blankmarmoraj kolonoj ĉiu kun delikate gravurita drako. Ekster la palaca urbeto estis la imperiestra urbo ĉirkaŭita de la meza murego kaj ekster tiu estis la ĉefurbo ĉirkaŭita de la ekstera murego. La ekstera murego longis 20 kilometrojn kun 9 pordegoj. En Pekino estis larĝaj kaj

rektaj stratoj, grandaj staploj, altaj sonoril-turo kaj tambur-turo, multaj loĝdomoj, vendejoj kaj temploj. La registaraj oficejoj koncentriĝis en ĝia suda parto. La tuta urbo, kun harmonia dispozicio kaj grandiozaj konstruaĵoj, estas majstroverko de la urba arkitekturo en la antikva Ĉinio.


Por preventi atakon de mongolaj kavalerianoj oni rekonstruis la Grandan Muron dum preskaŭ 200 jaroj ekde la fondiĝo de Ming-dinastio. La Granda Muro de Ming-dinastio, kiun la hodiaŭaj turistoj vizitadas, komenciĝas de la pasejo Ŝanhajgŭan en la oriento kaj finiĝas ĉe la pasejo Ĝjajugŭan en la okcidento, kun longeco de pli ol 6 000 kilometroj. Ĝi, plejparte bone konservita, estas unu el la plej grandaj konstruaĵoj en la mondo.

EKSPEDICIOJ DE ĜENG HE

En la komenca periodo de Ming-dinastio Ĉinio estis unu el la riĉaj kaj potencaj landoj en

la mondo. Multe da alilandaj senditoj kaj komercistoj ofte venis al Ĉinio por fari viziton aŭ negocon. Por plifortigi la rilaton inter Ĉinio kaj aliaj landoj, la imperiestro Ĉengzu sendis Ĝeng He al landoj en sudorienta Azio kaj ĉe la marbordoj de la Hindia Oceano.

Ĝeng He (1371-1435 p. K.) estis hujo de Junnan-provinco kaj servis kiel eŭnuko en la imperiestra palaco. En 1405 li estis sendita eksterlanden, gvidante ĉirkaŭ 27 800 armeanojn, interpretistojn, aĉetistojn, maristojn, metiistojn kaj kuracistojn kaj kunportante grandan kvanton da oro, arĝento, silkaĵoj, porcelanaĵoj, feraĵoj kaj ŝtofoj. Ili ekveturis de la haveno Ljuĝjagang (la nuna urbeto Ljuhe, Tajcang-gubernio, Ĝjansu-provinco) per 62 grandaj marŝipoj. Tiuj marŝipoj estis la plej grandaj en la tiama mondo; ĉiu, 147 metrojn longa kaj 60 metrojn larĝa, kun 12 veloj kaj 200-300 ŝipanoj, povis veturigi mil pasaĝerojn. La floto transpasis la Orientan kaj



La floto de Ĝeng He (Olepentraĵo)

Sudan Ĉinajn Marojn, atingis Ĝanĉeng (en la mezsuda parto de la nuna Vjetnamio) kaj poste sin turnis al landoj en sudorienta Azio kaj ĉe la marbordoj de la Hindia Oceano.

Inter 1405-1433, Ĝeng He sep-foje gvidis ekspedicion trans marojn kaj oceanojn. Ili atingis Hindoĉinion, Malajan insularon, Bangladeŝon, Hindion, Iranon, Arabion kaj aliajn landojn kaj regionojn, eĉ la orientan marbordon de Afriko kaj la bordon de la Ruĝa Maro.

Ili estis bonvenigitaj de ĉiuj vizitataj landoj. Post sia atingo ili esprimis sian celon al la reĝo de la vizitataj landoj, faris al ili donacon, kaj poste komercis kun la lokaj aŭtoritatoj kaj komercistoj. La varoj, kiujn ili alportis, precipe silkaĵoj kaj blu-desegnaj porcelanaĵoj, ĝuis grandan debiton. Ili aĉetis de tiuj landoj gemojn, perlojn, koralojn kaj parfumon. Kun konsento de reĝo de Manciĝa (la nuna Malako) en la Malaja Duoninsulo, Ĝeng He konstruigis tie staplon, tiel ke liaj ŝipoj povis tie kolektiĝi, ordigi siajn varojn kaj atendi ĝis la leviĝo de maja suda vento por reveni al Ĉinio.

Reĝoj de iuj landoj aŭ iliaj senditoj ofte veturis al Ĉinio per la revenantaj ŝipoj de Ĝeng He. Ili alportis al la imperiestro de Ming-dinastio strutojn, leonojn, zebrojn, ĝirafojn kaj aliajn donacojn. Ming-registaro varme ilin akceptis, reciprokis donacojn kaj ordonis Ĝeng He resendi ilin hejmlanden en la venonta ekspedicio.

La sep penigaj ekspedicioj de Ĝeng He montris la sentiman kuraĝon de la ĉina popolo kaj ilian altan teknikon en mara navigacio. Tiu granda entrepreno en la marnaviga historio de la mondo okazis je duon-jarcento pli frue ol la vojaĝo de Vasco da Gama al Hindio preter la Bonespera Kabo kaj tiu de Cristoforo Colombo al Ameriko. Ĝi akcelis la ekonomian kaj kulturalan interŝanĝon inter Ĉinio kaj multaj landoj en Azio kaj Afriko kaj plifortigis la amikecon inter la ĉina popolo kaj la popoloj de tiuj landoj.

LA ĜERMADO DE KAPITALISMO

La agrikultura produktado en la meza periodo de Ming-dinastio atingis tre altan nivelon. Oni pligrandigis la plantan areon de rizo

en norda Ĉinio kaj dufoje rikolta rizo en la suda. En la malfrua periodo de Ming-dinastio la batao kaj tabako de Ameriko enkondukiĝis en Ĉinion. La koton-kulturado populariĝis kaj en la sudo kaj en la nordo. La silkraŭpa bredado prosperiĝis sude de Jangzi-rivero, kie estis vastaj morus-kampoj.

Multe disvolviĝis ankaŭ diversaj metioj. En Zunhŭa, Hebej-provinco, troviĝis ferfanda forno je 4 metroj alta, kiu povis enteni pli ol 1 000 kilogramojn da fera erco kaj kies fajroblovilo bezonis 4-6 manipulantojn. En Ĝingdeĝen, urbo de Ĝjangŝi-provinco, kiu longis je 6.5 kilometroj de norde suden, estis 58 ŝtataj fornoj kaj 900 privataj porbaki porcelanaĵojn. La porcelanaĵoj tie grandnombre produktitaj estis multaspecaj kaj bonkvalitaj. En la urbetoj kaj vilaĝoj de la gubernio Songĝjang (la nuna regiono sude de Usong-rivero en Ŝanhajo) preskaŭ ĉiu familio sin okupis pri tekstilado, kaj ĉiutage dekmil ruloj da ŝtofoj liveriĝis al la merkato.

Kun la disvolviĝo de agrikulturo kaj metioj kreskis ankaŭ la komerca ekonomio. En la lando aperis pli ol 30 kompare grandaj urboj. Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ estis urboj kun plej disvolviĝinta silka tekstilado. Songĝjang estis centro de kotona kaj silka tekstilado kaj Ĝingdeĝen — centro de porcelana industrio. La urbo Ĉengdu de Siĉŭan-provinco estis fama te-merkato kaj Uĉang de Hubej-provinco estis fama merkato de ligno. La urbo Jangĝoŭ ĉe la Granda Kanalo estis loko por kolektado kaj distribuado de salo. Ningbo, Ĉjŭanĝoŭ kaj Kantono servis kiel ĉefaj havenoj, de kie granda kvanto da varoj ekspor-

tiĝis al Japanio, sudorienta Azio kaj aliaj landoj.

En la meza kaj malfrua periodo de Ming-dinastio la kapitalisma produkto-rilato ĝermis sude de Jangzi-rivero, kie prosperis la komerca ekonomio. En Suĝoŭ kun disvolviĝinta silka tekstilado multaj familioj sin okupis ekskluzive pri la produktado de silkaĵoj. Iuj el ili posedis grandan kapitalon. Aĉetinte al si 20-40 teksilojn kaj dunginte dekojn da laboristoj, ili starigis siajn metiejojn respektive. En Suĝoŭ troviĝis sume kelkmil tekstistoj, iuj konstantaj kun fiksa laborposteno, aliaj nur portempaj. En tiu tempo la natura ekonomio kombinanta agrikulturon kun hejmaj metioj ankoraŭ okupis la ĉefan pozicion en la lando, kaj la ĵus ĝerminta kapitalisma produkto-rilato disvolviĝis malrapide.

INSUREKCIO DE LI ZIĈENG

En la malfrua periodo de Ming-dinastio granda kvanto da agroj koncentriĝis en la mano de riĉuloj. La imperiestro ofte donacis al nobeloj, meritaj kor-

teĝaj eŭnukoj grandan areon da agroj kiel bienon, sekve de tio multe da kamparanoj fariĝis farmantoj. La bienuloj ŝarĝis ilin per pezaj lupagoj. En la lastaj jaroj de Ming-dinastio, rezulte de sinsekvaj naturaj katastrofoj, la kampoj donis nenian rikolton en la norda parto de Ŝenŝji-provinco, kaj la kamparanoj devis sin nutri per herbaj semoj kaj arbaj ŝeloj, sed la registaro montris nenian indulgon en sia impostado. La kamparanoj en tiu loko ne plu povis toleri kaj leviĝis al batalo. Inter la ribelantoj aperis elstara gvidanto Li Ziĉeng.

Li Ziĉeng (1606-1645 p. K.) estis ŝafisto de bienulo en la infanaĝo, kaj poste por eviti kreditorojn li aliĝis al la ribelantaro. Li vivis abnegacie kaj batalis brave, pro kio li estis respektata de la ribelantoj kaj popolanoj kaj fariĝis gvidanto de la ribela armeo, kun la titolo "Ĉŭang-ŭang" (t.e. brava reĝo). Liaj trupoj estis rigore disciplinitaj. Li elmetis la sloganon "Distribui la agrojn al la kamparanoj kaj liberigi ilin de impostoj", pro kio li ricevis varman subtenon

de la popolanoj. Inter la popolamasoj cirkulis la onidiro:

"Malfermu l' pordon nun al Lia Moŝto, kiu senigos nin je la imposto."

En 1643 Li Ziĉeng fondis la regpotencon Daŝun. Baldaŭ lia armeo transpasis la Flavan Riveron, marŝis tra la pasejo Ĝjujungŭan kaj sieĝis Pekinon. La sieĝata armeo de Ming-dinastio kapitulacis, kaj la imperiestro Ĉongĝen (inter 1628 kaj 1644 p. K. sur trono) sin mortigis. Vidinte la neeviteblan malvenkon, U Sanguj, generalo de Ming-dinastio, garnizonanta ĉe la pasejo Ŝanhajĝŭan, kapitulacis al la regpotenco Ĉing starigita de la manĉuroj en nordorienta Ĉinio. Li Ziĉeng faris orienten-ekspedicion kaj intense batalis kontraŭ U Sanguj kaj la armeo de Ĉing-reĝimo, sed malsukcesis. La ribelantoj retiriĝis al Pekino kaj poste al Ŝenŝji-provinco. La armeo de Ĉing okupis Pekinon kaj faris furiozajn atakojn kontraŭ la ribela armeo. Fine la 39-jara Li Ziĉeng heroe mortis en Hu-bej-provinco. Kaj komenciĝis la regado de Ĉing-dinastio en la ĉina historio.

Triumfo de Li Ziĉeng (Ĉinstila pentraĵo)



Montpasejo Helan

de ŬEJ LJAŬ

LAŬ la orienta bordo de la Flava Rivero, la Granda Muro serpentumas norden 200 kilometrojn al la norda piedo de la montaro Helan, kaj returniĝas suden, zigzagas inter la trapasejoj de la montaro Helan longa 250 kilometrojn. En sinsekvaj tagoj, mi vagis tie, kvazaŭ aŭdis lantajn, sed majestajn paŝojn de la giganto Historio.

PRIMITIVAJ ROKGRAVURAĴOJ

De Jinĉuan, ĉefurbo de la Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, nia ĵipo balance veturis pli ol unu horon inter ŝtonoj, kavoj kaj sablomontetoj ĉe la piedo de la montaro Helan. Fine antaŭ ni aperis la mistera montpasejo Helan.

Vere mirakla mondo ĝi estas!

Sur la krutaĵoj ambaŭflanke de la montvalo kontinua je pli ol 600 metroj dislokiĝas pli ol 300 gravuritaj bildoj.

Sur la suda deklivo ĉe la enirejo estas bildo de versimila azeno. Je pli ol dudek metroj okcidente, sur la rokmuro gravuriĝis tri bestoj similaj al lupoj, el kiuj du petolas unu kun la alia. Tri metrojn supre de ĝi estas du nudaj homfiguroj kun arko inter si, kvazaŭ ĉasantaj.

Sur la nordokcidenta roko estas bildo de groteska nuda homo, kun nebuleta vizaĝ-konturo. La strukturo estas simpla kaj la gravurado kruda. Tiu gravuraĵo, je 78 cm. alta kaj je 35 cm. larĝa, estas la plej granda el la gravuraĵoj.

Inter la rok-gravuraĵoj, la figuroj de homa kapo estas pli multaj. Ili ĝenerale havas mal-


fermitan buŝon, montratajn dentojn kaj hirtajn harojn, aŭ kornojn sur la kapo, du orelojn pendantajn. Estas ankaŭ simplaj bildoj de brakoj kaj ripoj.

Ĉe la montaro Helan vivis antikvaj naciminitatoj de norda Ĉinio. Plejparto el tiuj rok-gravuraĵoj estas historiaj restaĵoj de la nordaj nomadaj naciminitatoj antaŭ la periodo de Prin-tempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regno (770-221 a. K.).


Antaŭ tiuj krudaj kaj infancaj rok-gravuraĵoj, mi kvazaŭ sentus varman spiron eligitan de la homaro en infaneco.

Tamen, kiam mi denove enĵipiĝis kaj forlasis la montpasejon, la ĵus viditaj scenoj tuj fariĝis tre malproksimaj, kiel malproksimaj steloj en la nokta firmamento. Oni povas vidi nur ilian lumon.

Azeno gravurita sur roko ĉe la montpasejo Helan



Panoramo de la Dezertologia Stacio ĉe Sapotoŭ



REĜAJ MAŪZOLEOJ DE LA REGNO OKCIDENTA ŜJA

Forlasinte la montpasejon Helan, la ŝoforo direktis la ĵipon suden al la montpasejo Sangŭankoŭ okdek kilometrojn fore. La vojo estas zigzaga, malfacile veturebla. La ĵipo veturis jen dekstren, jen maldekstren, jen kliniĝis je 45 gradoj. Mi firme tenis la tenilon, dume la ŝoforo mienis ĝoje, kvazaŭ ĉiu kavo sur la vojo alportus al li senliman plezuron.

Je dudek kilometroj antaŭ la montpasejo Sangŭankoŭ ni enveturis la reĝmaŭzolean ĝardenon de la regno Okcidenta Ŝja.

Nia ĵipo zigzage kuris inter pli ol 70 maŭzoleoj de reĝoj, ĉefministroj kaj generaloj. Min multe surprizis ilia simpleco kaj krudeco. La tiel nomataj reĝmaŭzoleoj, precize dirite, estas nur grandaj teramasoj altaj je dekoj da metroj, simetrie dislokita sur dezerta monteta zono, longa je dek km. de sudo al nordo, kaj larĝa je kvar km.

La perejo de la regno portis tragedian koloron.

En la jaro 1020, la regno Okcidenta Ŝja oficiale prenis Ŝingĝoŭ (nun Jinĉŭan) kiel sian ĉefurbon. En la prospera periodo de la regno, Ŝingĝoŭ estis grandioza ĉefurbo.

Poste reĝo Li Jŭanhaŭ vivis diboĉe. Li mobilizis dekmilojn da laboruloj por konstrui grandan luksan kastelon, kie li tuttage sin amuzis kun siaj edzinoj.

Post la morto de Li Jŭanhaŭ, des pli dekadencis la regno. Atakite de la armeo gvidata de Ĝingis-Ĥano, la regno pereis en la jaro 1227. La Ĥano venĝe forbruligis ĉiujn konstruaĵojn de la venkita regno, pro sia terura perdo en la kruela milito.

La imponaj grandiozaj palaco kaj kasteloj jam antaŭ longe fariĝis ruinoj, kaj vidiĝis nur kalvaj tombegoj sur la dezerto.

Elirinte el la reĝmaŭzolea ĝardeno, ni daŭre veturis suden. Veturinte kelkajn kilometrojn, ni atingis la montpasejon Sangŭankoŭ. Tie Ĝingis-Ĥano siatempe frakasis la armeon de la regno Okcidenta Ŝja kaj direktis sian lancopinton rekte al ĝia ĉefurbo.

Sangŭankoŭ estas danĝera pasejo el la gravaj pasejoj de la montaro Helan. Ambaŭflanke de la valo staras ŝtonaj krutaĵoj kaj sennombraj montpintoj. Eble pro la historia leciono, Ming-dinastio konstruis tie tri ĉirkaŭmurojn de oriento al okcidento en 1539 kaj sendis kvar mil soldatojn por gardi la fortikaĵon.


Nun ankoraŭ videblas restaĵoj de la ĉirkaŭmuroj kaj fumfaraj terasoj kaj fortikaĵoj.

NOVA URBO ĈE LA GRANDA MURO

De la montpasejo Sangŭankoŭ ni veturis 60 kilometrojn orienten laŭ larĝa kaj ebena ŝoseo kaj revenis al Jinĉŭan vespere.

Adiaŭinte la ŝoforon, mi, ankoraŭ interesplena, sola ascendis la pagodon de la templo Ĉengtjan okcidente de la urbo. Mal-supren rigardante, mi vidis novan urbon kuŝantan sur la ruino estigita de Ĝingis-Ĥano siatempe. Arbare staras la altaj fumtuboj, unu apud alia staras la novaj etaĝdomoj, interkruciĝas la smeraldaj aleoj kaj larĝaj ŝoseoj en nova kaj malnova kvartaloj.

Jinĉŭan havas 600 000 loĝantojn, ĝia nuna areo grandiĝis 6.5-oble kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo en 1949.




La Sonora Sablomonto proksime de Ŝapotoŭ

Laŭ historiaj notoj Jinĉŭan tiam havis nur kelkajn malgrandajn fabrikojn. Dank' al la pli ol-30-jara konstruado, tie jam aperis pli ol 300 fabrikoj de metalurgio, elektro, meĥaniko, kaŭĉuko, kemiindustrio, ŝpinteksaĉo, elektronaj instrumentoj, konstru-materialo, instrumentoj, presado, ledo, papero kaj manĝaĵo, kun ĉ. centmil laboristoj el huj-a, han-a, manĉura kaj aliaj naciecoj.

La Jinĉŭan-a Lana Ŝpinteksejo en nova kvartalo produktas lanajn litkovrilojn, ŝtofon kaj drapon el la fama Tan-ŝaflano de Ningŝja. El ĝiaj produktaĵoj aparte allogaj estas ĵakarda lana litkovrilo kaj tiu kun am-anasaj desegnoj. Ili eksportiĝas al 25 lan-

SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO



doj kaj regionoj, kaj ĝuas grandan famon.

La ilmaŝina fabriko Ĉangĉeng en la nova kvartalo konstruita en 1965 produktas 51 specojn de memprojektitaj ilmaŝinoj. Ĝiaj cifero-regantaj ilmaŝinoj vendiĝas en 27 landoj de la kvin kontinentoj.

Kiam falis nokta vualo, mi forlasis la templon Ĉengtjan kaj paŝis al mia hotelo en prilumado de sennombraj lampoj.

DRAKO APUD LA GRANDA MURO

En la sekvinta tagmezo, mi forlasis Jinĉuan kaj veturis suden trajne.

Post du-hora kurado la trajno sin turnis okcidenten. Trairinte longan tunelon ĝi lasis malantaŭ si la montpasejon Ŝengĝin.

Ĉe Ŝapotoŭ, 50 kilometrojn okcidente de la pasejo, mi elvagoniĝis por serĉi spuron de "drako".

En la Sonora Sablomonto mi renkontis "drakon".

La monto situas ĉe la norda bordo de la Flava Rivero, proksime al Ŝapotoŭ. Arda suno bakis min. Se iu glitas malsupren de la monto-supro, rapide falas ankaŭ sekegaj sableroj, eligante surdigan sonon.

Legendo diras, ke antaŭ longa longa tempo, estis flava drako kaj nigra drako, kiuj transformiĝis respektive en sablon kaj la Flavan Riveron. En Ŝapotoŭ estis urbo nomata Osmanto. Foje la flava drako provokis batalon al la nigra drako ĉe la urbo. La flava drako eligis fiblovon. Tuj mallumiĝis la ĉielo, leviĝis sablo kaj ruliĝis ŝtonoj. En palpebruma daŭro aperis sablomonto, ĝi estas la nuna Sonora Sablomonto. Ĝi detranĉis la riveron kaj englutis la urbon Osmanto. La nigra drako ne estis timigita. Per sia kontinua akvofluo ĝi traboris la sablan monton, kunligis sian vunditan korpon, kaj daŭrigis sian vojaĝon orienten. Poste, ĝia torento forpuŝis duonon de la sabla monto kaj lasis nur hakite ebenan krutaĵon. Ekde tiam, ĉiufoje kiam oni grimpas sur la sablomonton, la flava drako opinias ke la homoj mokas ĝin pro ĝia malvenko, sekve eligas korŝiran ĝemadon.

Tiu legendo esprimis la fortan aspiron de antikvaj ĉinaj laboruloj por venki la sablan katastrofon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ĉe la sabla monto vere aperis longa drako por venki la sablon, t. e. la fera drako tra sudorienta rando de la vasta gobio Tengeli.

Tiu gobia fervojo longa je 40 kilometroj estas parto de la fervojo de Baŭtoŭ al Lanĝoŭ. De 1956, sciencistoj de la Lanĝoŭ-a Instituto pri Sablo sub la Ĉina Akademio de Sciencoj faris sisteman esploradon kaj grandskalan praktikon por jungi sablon, starigis forstozonon larĝan je kvincent metroj kaj longan je pli ol kvardek kilometroj, kiu efike katenis la flusablan katastrofon. Pli mirinde estas ke oni starigis duonkaŝitan kvadratitan pajlan plektobarilon kontraŭ sablo. Sur tiu barilo oni disemis kontraŭsablaĵajn herbosemojn. Post dek ĝis dek kvin jaroj, sen irigacio, tie aperis artefarita herbejo.

Mi promenis sur la Sonora Sablomonto, kaj vidis la kvadratitan herban sablobarilon sterniĝanta ambaŭflanke de la fervojo kiel verda tapiŝo. Prospe-raj vegetaĵoj kovras la senliman sablon. La gobio mirakle fariĝis oazo. De sia oficiala ekfunkcio en 1958, la fervojo de Baŭtoŭ al Lanĝoŭ neniam estis obstrukcita. Tio vekis atenton ĉe sciencistoj ĉinaj kaj fremdlandaj.

En ekstreme granda eksciteco mi ascendis la fervojon. De malproksime aŭdiĝis lokomotiva fajfo. Mi vidus ke la Historio galopas fajfante al mi de la fora horizonto.




ĈE LA PIEDO DE HELAN-MONTARO

Fotoj de LI ĈUNGENG


Ruino de la antikva
Granda Muro en la
montaro

Sablofiksaĵoj faritaj el fragmitoj





La superba templo Gaŭmjaŭ norde de la gubernio Ĝongŭej, konstruita en la 14-a jarcento



Parto de Ĉingtongŝja-hidroelektrejo



Riĉa rikolto de pomoj sur bonigita sabla grundo

Antikvaj norioj ĉe la Flava Rivero



La Dancdramo "Meĉo-Floro"

Fotoj de CAJ HAJFENG



Dulin svatiĝas je la feino.

12

Danco de brokado



La feino de "Meĉo-floro"



Esperantaj poŝtmarkoj



1



2



3



4



5



6



7



8



9



10



11



12



13



14



15



16



17



18



19



20



21



22



23



24




25



26



27



28



29



30



31



32



33



34



35



36